

J-19034/1992


ISSN 0032-4361

5 1992

中國報通
EL POPOLA


CINIO






Suzhou-strato en antikva stilo en la Somera Palaco de Pekino

Foto de LING YOUJUAN





INTER NI

Bonvenaj voĉoj de legantoj

Lastatempe ni ricevis 163 leterojn el Pollando, Brazilo, Germanio, Francio kaj aliaj 38 landoj. Koncernis multajn aferojn tiuj leteroj, kiujn ni resumis jene: Iuj entuziasme laŭdis, ke, legante EPC, oni ĉiam sentas sin plezure kiel en festoj. Oni faris ankaŭ honestan kritikon, ke ni ne devis apartigi malgrandajn fotojn sur du paĝojn (Por vigligi paĝaranĝon kaj variigi la enhavon, ni ne povas ne tiel fari — La Red.). Pluraj legantoj sendis al ni manuskripton por ĝin publikigi en nia gazeto, tiel ili fariĝis el legantoj kontribuantoj. Multaj legantoj konigis al ni aferojn pri sialanda E-movado por riĉigi la enhavon de “Esp-novajoj”. Multaj samideanoj volis aperigi siajn korespondajn dezirojn por serĉi leteramikojn de eksterlando. Estas ankaŭ iuj, kiuj esperis, ke ni helpas ilin aboni gazetojn, mendi librojn kaj aĉeti aliajn objektojn. Multaj sendis al ni salutojn kaj bondezirojn de malproksime. El orienta Eŭropo iuj skribis al ni, plendante pri siaj malfaciloj.

Ni dankas tiujn legantojn, kiuj nin fidis kaj per siaj leteroj subtenis nin. Ni esperas ofte aŭdi la voĉojn de niaj legantoj. Tio multe helpas nin en la laboro kaj plifortigas nian amikecon. **La Red.**

Kaskado
Foto de **SUN YI**


ENHAVO

- 6 Antaŭ kaj post la reguligo de la ĉina ekonomio
- 8 **La unua bazaro de pogranda vendata greno en Ĉinio**
- 23 Modaj fasonoj de Moniza
- 12 Sinteza utiligo de metano en Ĉinio
- 22 Chen Zhangliang, reformisto por novaj varioj de plantoj
- 38 Sportaj steloj kaj iliaj gepatroj
- 35 **La tria akrobata konkursejo de la mondo**
- 48 *POR VIA SANO:*
Kuŝa ĉigong-o
- 27 *ARTOJ DE ĈINIO:*
Ye Qianyu, "makisano" en la ĉina pentrista rondo
- 34 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 40 Ĝenerale pri la nuna vivo de ĉinoj
- 44 *LOGDOMOJ KAJ MOROJ:*
Vojaĝo al antikvaj urbeto kaj vilaĝoj en montregionoj
- 51 *LAŬ ANTIKVA VOJO AL TIBETO (VI):*

- Sonorado de Qutan-templo
- 42 Kupra minejo antaŭ 2 000 jaroj
- 49 *AMUZOJ*
- 30 *KURANTAJ AFEROJ*
- 14 Huanghai bonvenigas vin!
- 18 **Mi kaj Verda Majo**
- 16 Vizito al Oostende
- 50 *POR KOMENCANTOJ:*
Honesta knabineto
- 17 *ESP-NOVAĴOJ*
- 4 *INTER NI*
- 48 *KORESPONDI DEZIRAS*
- 2 Suzhou-strato en antikva stilo en la Somera Palaco de Pekino
- 4 Kaskado
- 10 En ordinara tago
- 32 Sutro-presejo en Dege — tibet-nacia kultura trezorejo
- 20 Ŝtonaj kruĉoj de Tao Changjun
- SUR LA KOVRILO:*
Fajfanta knabeto Foto de YU FENGLIANG
SUR LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Somermeza danco en parko
Knabineto en printempo

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Zhengzhou (p. 8)
- 2. Gongcheng-a Jaŭ-nacia Aŭtonoma Gubernio (p. 12)
- 3. Qingdao (p. 14)
- 4. Wuqiao (p. 35)
- 5. Wuyuan-gubernio (p. 44)



Antaŭ kaj post la reguligo de la ĉina

DE 1978 Ĉinio praktikis reforman kaj pordomalferman politikon en ekonomio, la ekonomia konstruado rapide disvolviĝis. La nacio plifortigis kaj la popola vivo multe pliboniĝis.

Tamen iam okazis, ke en la strategia penso aperis tendenco de troa strebado al sukceso en la ekonomia konstruado kaj reformo, kaj plie, mankis sperto, precipe mankis nesufiĉa kono pri inflacio, tiel ke la ŝtato ekhavis devion en makroreguligo de la tuta ekonomio. En la lasta trimestro de 1984 aperis troa disvolviĝo kaj malordo en la ĉina ekonomio. Tio montriĝis jene: Unue, kredit-livero kaj mon-emisio multe superis la kreskon de ekonomio en la sama periodo, la investo de la ŝtataj fiksjaj kapitaloj kaj la kresko de aĉetpovo de sociaj varoj superis la kreskon de la totala nacia produktovalorulo en la sama periodo, kio kaŭzis, ke la socia bezono pufiĝis kaj la socia provizo kaj bezono perdis sian ekvilibron. Samtempe, la nova kaj malnova sistemoj estis en anstataŭigado kaj la ekonomia ordo, precipe la cirkula estis en malordo, nemalmultaj entreprenoj plialtigis prezojn de varoj por ĉasi profiton en cirkulado, tiel ke aperis prezaltiĝo en granda proporcio, kio estigis la seriozan inflacion de 1988, kaj la merkato kaj socia ekonomio sin trovis en grava tumulto. Due, trorapida industria disvolviĝo, precipe troa disvolviĝo de prilabora industrio, serioze perdis la ekvilibron inter industriaj branĉoj unuflanke kaj agrikulturo, energio, krudmaterialoj kaj trafiko aliflanke, kaj tio malhelpis la socian produktadon.

Por ŝanĝi tiun situacion la ĉina registaro ellaboris en septembro de 1988 la politikon "reguligi ekonomian medion, reĝustigi ekonomian ordon kaj ĉiuflanke profundigi reformon". Reguligo kaj reĝustigo esence estis granda ekonomia reguligo, kun la celo redukti socian bezonon, ĉesigi malordon kaj reguligi industrian strukturon.

Antaŭ ĉio, la ŝtato alprenis la rimedojn reduk-

ti krediton, likvidi investon de fiksjaj kapitaloj, malgrandigi investoskalon, bremsi konsumadon de grupoj kaj plifortigi impostadon. Ĉio ĉi tio bremsis la troan kreskon de la socia bezono kaj plibonigis la rilaton inter provizo kaj bezono. En 1985-1988 la ĝenerala bezono de la socio superis ĝian ĝeneralan provizon meznombro je 11.8%. Post reguligo en 1989 ĝi reduktiĝis al 8.7%, en 1990 kaj 1991 al 7.6%. La totala proporcio de prezoj por podetala vendo kreskis je 18.5% en 1988, kompare kun tiu en 1987, ĝi falis al 17.8% en 1989, al 2.1% en 1990, kaj al ĉ. 3.5% en 1991. Dank' al la plibonigo de la rilato inter provizo kaj bezono, sur la enlanda merkato abundis varoj kun pli da specoj, la konsumantoj ekhavis pli grandan eblon elekti varojn, kaj aperis klientmerkatoj al multaj varoj.

Konsidere la cirkulan ordon de la merkato, la ŝtato plifortigis kontrolon pri kvalito kaj prezo de varoj, atingis rimarkindan sukceson en likvido de kompanioj okupiĝantaj pri komercaj-cirkulado, tiel ke la nombro de kompanioj multe reduktiĝis. Plejparto de kompanioj jam dekreĉiĝis de administrataj organoj de la ŝtato kaj ekpraktikis entreprenan administradon. Granda nombro da ŝtataj oficistoj ne plu laboris en kompanioj. Tio, ke utiligante siajn rajtojn, iuj kontraŭleĝe altigis prezojn de varoj, estis reĝustigita en certa grado kaj la merkata ordo pliboniĝis.

La reguligo bremsis la kreskon de iuj konsumbezonoj, tamen urbanoj kaj kamparanoj profitis de ekonomia disvolviĝo. En 1990 la pokapaj enspezoj de la urbanoj kaj kamparanoj kreskis je 5.2% kaj je 0.2% respektive, kompare kun tiuj en 1989, kaj je 8% kaj je 7% respektive en januaro ĝis septembro de 1991, kompare kun tiuj en la sama periodo de 1990. En 1990 la deponaĵoj de urbanoj kaj kamparanoj pliiĝis je 323.3 miliardoj da juanoj, kaj la nombro kreskis je 36% ĉiujare en la lastaj du jaroj.

Dum tiu tempo la ŝtato faris reguligon al la industria strukturo, kaj agrikulturo, energio, trafiko kaj krudmateriala industrio pli-malpli disvolviĝis.

ekonomio

Aliflanke, la prilabora industrio estis limigita, kaj iagrade ŝanĝiĝis la stato, ke senproportie disvolviĝis la bazaj industrioj kaj la nacia ekonomio. Laŭ la proporcioj de investoj de la bazaj industrioj en la investoj de fiksjaj kapitaloj en 1990 kaj 1988, la investo de agrikulturo kreskis je 26.8%, la proporcio en la totala investo kreskis de 2.3% al 2.8%; la investo de energio kreskis je 31.3%, la proporcio en la totala investo kreskis de 23.3% al 29%; la investo de trafiko kaj poŝt-komuniko kreskis je 9.7%, la proporcio en la totala investo leviĝis de 11.5% al 11.9%.

Post la reguligo evidente falis la trorapida ekonomia kresko. Nun la kresko de la nacia ekonomio jam respondas al la ekonomiaj kondiĉoj.

Pro kompare abundaj produktoj sur la enlanda merkato en la lastaj jaroj, okazis ŝanĝiĝo en provizo kaj bezono, kio metis materian bazon por disvolvi eksporton, kaj plie, plurfoja reĝustigo de interezo de fremda valuto kaj reformo de la eksterkomerca sistemo garantiis glatan eksportadon. En 1989-1990 la totala valoro de eksportaĵoj de Ĉinio atingis 52.5 miliardojn kaj 62.1 miliardojn da usonaj dolaroj respektive, kun meznombra pliiĝo de 14.3% ĉiujare. En 1990 la ekstera komerco de Ĉinio disvolviĝis en favora saldo. La fremd-valuta saldo de la lando kreskis jaro post jaro kaj la rezervo atingis 33 miliardojn da usonaj dolaroj en la fino de junio 1991, kio kreis rekordon en la historio. Samtempe kun tio, la pordomalfermo de Ĉinio faris novan paŝon antaŭen, tion ekzemplis la oficiala malfermo de Pudong de Ŝanhajo. De 1989 ĝis la unua duonjaro de 1991 la nombro de la sankciitaj entreprenoj investitaj de alilandaj komercistoj en Ĉinio estis 18 083, pli multe ol la totala nombro de la antaŭaj dek jaroj, kaj la investo de alilandaj komercistoj atingis 8.54 miliardojn da usonaj dolaroj, egale al 76.5% de la totala sumo de la antaŭaj dek jaroj.

Dum la reguligo la ŝtato grandamplekse reĝustigis la prezojn de energiaj, krudmaterialaj kaj agrikulturaj produktaĵoj. La reformo de la eksterkomerca sistemo atingis neatenditan sukceson. La ŝtataj

industriaj entreprenoj plejparte faris duafojan kontrakton en produktado, kaj la reformo de la kampara ekonomia sistemo kontinue perfektigis. Krome, la ŝtato faris provon en reformo de la sistemoj pri financo, imposto, asekuro, loĝado kaj kuracado kaj akiris ian sukceson. En makroreguligo Ĉinio iom post iom liberigis sin de administra rimedo kaj prenis prezon, profiton, imposton kaj ankaŭ necesajn leĝojn kiel la ĉefajn, kio enkorpiĝis la principon de la kombino de planizita ekonomio kaj merkata reguligo kaj metis bonan bazon por la disvolviĝo de la reformo kaj konstruado de Ĉinio.

En la lastaj tri jaroj la reguligo kaj reĝustigo, kiel rimedo en speciala periodo, atingis jam la ĉefajn celojn. Sed iuj problemoj en la ekonomia vivo ankoraŭ ne solviĝis, ekz. ekonomia profito de entreprenoj estas malalta, precipe rimarkinde falis la profito en produktado kaj cirkulado, tro-multiĝis elspezoj kaj leviĝis deficitito. Tion kaŭzis, krom neracia dispozicio de riĉfontoj, perturbo en la preza sistemo, malalta teknika nivelo kaj nebona administrado de entreprenoj, ankaŭ la "sekvaĵo" de la trorapida ekonomia disvolviĝo. Nun ankoraŭ ne estas raciaj la ekonomia kaj entreprenaj sistemoj de Ĉinio, al la entreprenoj mankas necesa administra memstareco kaj bremsa sistemo, ne perfektigis la sistemo por kuraĝigi bonajn kaj elkribri malbonajn, ĉio ĉi estas ĉefaj kaŭzoj pri malalta ekonomia profito.

Pro malalta ekonomia profito de entreprenoj, la ŝtato estis ŝarĝita per granda financa subvencio. En la lastaj jaroj Ĉinio alfrontis ŝuldo-redonan kulminon. Por la trogranda organismo kaj laborantaro, la ŝtato multe elspezis. Ĝenerale ekzistis nerigoraj financaj disciplinoj, fraŭdo kaj prokrasto de impostopago, kio kaŭzis malfacilon al la ŝtata financo.

Malgraŭ la supre dirita, la ĉina registaro turnis la ekonomian laboron sur normalan orbiton de reformo kaj disvolviĝo kaj strebas por solvi la restajn problemojn en reformo unu post alia. ■

La Unua Bazaro de Pogrando Vendata Greno en Ĉinio

“NUN vendiĝas freŝa tritiko. La vendanto estas la Zhumadian-a Kompanio de Greno kaj Oleo, Henan-provinco. Ĝia tritiko en novaj jutsakoj transportiĝos fervoje.” Apenaŭ la aŭkciisto tion diris, la vendanto prezentis specimenon, kio allogis multajn ĉeestantojn.

Post kontrolo la aŭkciisto deklaris: “La tritiko vendiĝos je minimuma prezo de 0.84 juano por ĉiu kilogramo.” Oni foje refoje pliproponis prezon. Kiam delegito de la Ĉina Kompanio de Grena Komercoproponis la prezon je 0.86 juano po ĉiu kilogramo, neniu konkuris plu.

Eksonis gongo kaj la aŭkcio sukcesis. La kompanio aĉetis la grenon je la supre menciita prezo.

Tio okazis sur la Zhengzhou-a Bazaro de Pogrando Vendata Greno en la ĉefurbo de Henan-provinco en centra Ĉinio. S-ro Li Jingmou, respondeculo de la bazaro, diris al mi, ke la bazaro tie starigita de la lando estas priatentata de multaj personoj eksterlandaj. En Ĉinio oni rigardas tion provo de reformo en la cirkula sistemo de greno kaj en la okuloj de eksterlandanoj tio estas grava marko, ke Ĉinio daŭrigos la politikon de reformado kaj pordomalfermo.

REFORMO KAŬZITA DE GRENO

Ĉinio havas multajn loĝantojn

kaj malmultajn kultureblajn kampojn, kaj greno estas problemo ĉiam koncernanta la stabilecon de la lando. Post kiam Ĉinio ekpraktikis en la kamparo la respondecan sistemon pri laŭkontraktata produktado antaŭ pli ol dek jaroj, la greno produktado rapide disvolviĝis. Nun en Ĉinio la greno sufiĉis por la bezono kun iom da resto. Tamen, tre malmulta estas la poka kvanto de greno. Por plua pli-produktado de greno la ĉina registaro faris serion da reformoj en la cirkula kampo. Anstataŭ ke nur komercaj departementoj de la ŝtato rajtas entrepreni aĉeton kaj provizon de greno, nun la registaro permesas ankaŭ alies entreprenadon, reduktante laŭkontraktan mendon kaj pliiĝante aĉeton kaj provizon je merkata prezo. En 1984 laŭ plano la registaro aĉetis 100 miliardojn da kilogramoj da greno laŭ la ŝtata prezo kaj en 1989 la aĉetita kvanto malkreskis al 50 miliardoj da kilogramoj, dum la kvanto aĉetita laŭ la merkata prezo kreskis de 9.3 miliardoj da kg. en 1984 al 50 miliardoj da kg. en 1989. En la sama tempo en urboj kaj vilaĝoj de la lando aperis multaj bazaroj de greno vendata laŭ la merkata prezo, kun la kvanto pli granda kaj speco pli multa ol tiuj de greno vendata laŭ la ŝtata prezo. Sole, en Xinyang de Henan-provinco troviĝas ĉ. 300 grandaj kaj malgrandaj tiaj bazaroj.

La ŝanĝiĝo en provizo kaj mendo kaj la malfermo de la greno bazaro kaŭzis nestabilecon de

grena prezo, tiel ke la interesoj de la kamparanoj estis damaĝitaj kaj la greno plano de la ŝtato estis difektita. Kaj krome, la misinformoj pri merkato malbone influis la aktivecon de kamparanoj. Aliflanke, por kontentigi la bezonon de la popolo kaj kovri la nesufiĉecon de greno vendata laŭ ŝtata prezo, oni devis multe klopodi por aĉeti la bezonatan grenon. En 1989 la porgrenaj departementoj de Guangdong-provinco sendis sume 1 500 personojn por tiu afero. Pro malbona plenumo de kontraktoj ili devigite faris kontrakton pri greno kun kvanto dekoble pli granda ol tiu de la bezonata, por garantii la normalan vendon de greno en la provinco. El tio ofte okazis, ke oni akaparis grenon, monopoligis grenan merkaton kaj draste plialtigis la vendprezon. Jen okazis la batalo por greno.


Ĝuste sub tiaj cirkonstancoj la provinco Henan la unua starigis bazaron de pogrando vendata greno. Julie de 1990 la Ŝtata Konsilantaro decidis starigi la Zhengzhou-an Bazaron de Pogrando Vendata Greno, la unuan tian bazaron en Ĉinio por reguligi la provizon kaj mendon kaj akceli la harmonian kombinaĵon de planizita ekonomio kun la merkata.

“PREZARO DE ZHENGZHOU”

Mi informiĝis de s-ro Li Jingmou, ke la ekfunkcio de la greno bazaro koincidis kun malvigliĝo de la ĉina merkato, kaj plie, oni ne havis sufiĉan konon pri ĝi, nek



Negocejo de la Bazaro de Pogrande Vendata Greno



Fremdlanda kliento

alkutimiĝis al aŭkcio. Rezulte de tio, iam stagnis ĝia negocado.

Por ŝanĝi la staton oni faris la jenon: ŝanĝi simplan negocon de tritiko en tiun de greno kaj manĝebla oleo; pli frue elabori planon pri transporto de la varoj per fervojo por la mendanto; mildigi la limigon de prezaro; ne imposti la negocadon kaj stampopaperon; kaj samtempe kompletigi la organismon de negoco; ĉiutage funkciigi la bazaron, kio okazis antaŭe po tri tagoj en ĉiu semajno; kaj okazigi pli grandan foiron inter la 15-a kaj 25-a en ĉiu monato. En la daŭro de unu jaro la bazaro sukcese faris kontraktojn je 600 milionoj da kilogramoj da greno kaj manĝebla oleo kaj 90% de la kontraktoj estis plenumitaj. Nun pli ol 20 provincoj kaj municipoj sendis siajn delegitojn tien por komercado.

De sia naskiĝo la bazaro publikigas al la tuta lando prezaron de greno en ĉiu tagdeko per gazetara kanalo kaj ludas iagrade gvidan rolon pri grena prezaro. Iu ŝtata kultivejo en la urbo Jiaozuo, Henan-provinco, deziris vendi tritikon, tamen ĝi ne sukcesis forvendi ĝin je prezo de 0.85 juano por ĉiu kilogramo. Poste, ĝi komisiis aŭkcii la tritikon al la bazaro. Tiu tuj forvendis ĝin je 0.86 juano por kilogramo. Iu negocisto el Henan diris al mi: "La publikigo de la grena prezaro de la bazaro aŭtoritate certigis la kamparanojn. Ili ne

plu vendos sian grenon je malpli alta prezo."

La publika negocado en la bazaro iagrade ŝanĝis la fenomenon, ke la aĉetistoj kaj vendistoj ĉie klopodis por plenumi sian taskon. Per tio oni malaltigis produktokoston kaj ŝparis laborfortojn. En la pasinteco la grenaĉetistoj devis veturi al multaj lokoj por plenumi sian taskon. Por tio ili elspezis multe. Kaj nun, ĉiuj negocistoj pagas nur 1.5% de la totala monsumo de la vendita greno antaŭ la negoca sukcesigo. Ili ŝparas pli multe, se oni komisiis al la bazaro peri la kontrakton.

VOJO AL REGULA NEGOCO

En la pasinta jaro la Zhengzhou-a Bazaro de Pogrande Vendata Greno tenis la negocon en publikeco kaj certa amplekseco kaj ŝanĝis la tradician negocon sekretan kaj fermitan. Laŭ difino, ĉiu negocanto de la bazaro devas posedi fonduson de pli ol 300 000 juanoj, vendi pli ol 50 milionojn da kilogramoj da greno ĉiujare kaj neniam malobservi leĝon. Nun la bazaro havas 280 membronegocantojn rigore ekzamenitajn.

La bazaro praktikas ankaŭ sistemon de garantia fonduso kaj tiun de danĝerdivido. La kontraktantoj devas pagi garantiaĵon proporcie al la kontraktita monsumo por sukcesigi observon de la kontraktoj. La

ŝtato siaflanke devas partopreni en divido de danĝero por longtempa kontrakto. Ĉio ĉi tio kreis favorajn kondiĉojn por transiro de la bazara negoco al regula negoco.

La longtempa kontrakto utilas al produktado, kaj pli grave, ĝia anticipa prezaro alportas merkatajn informojn al la grenaj produktantoj, kaj sekve de tio por la administrantoj kaj prilaborantoj de greno malpliĝis danĝeroj kaŭzitaj de la preza nestabileco. La Zhengzhou-a bazaro donis bonan ekzemplon al la grenaj bazaroj en Heilongjiang, Jiujiang, Wuhu, Hubei, Jilin kaj aliaj lokoj. Ĝi donis ekzemplon ankaŭ al la Weihai-a Bazaro de Pogrande Vendataj Arakidsemoj.

Kompreneble, la Zhengzhou-a bazaro estas nova afero naskiĝinta en transiro de la malnova sistemo al la nova en Ĉinio. Ĝi certe renkontos multajn malfacilojn en sia kresko. Kaj krome, estis ankaŭ multaj malfaciloj, kiujn la bazaro ne povas venki per si mem. Ekz. pro nesufiĉeco de trajna transporta povo, oni ne povis ne limigi la negocon tie, kie regis transporta streĉiteco. Kaj krome, la negockvanto interne de la bazaro estis tre malgranda. Henan-provinco transportas ĉiujare ĉ. du milionojn da tunoj da greno al aliaj lokoj, sed nur triono estis liverita al la Zhengzhou-a bazaro. ■



Kampanano-turistoj sur Tian'anmen-placo en Pekino


En ordinara tago

de YAN JIN

Ora jubileo de geedzoj



Helpemo







Samaĝaj beboj

La 5-a de majo 1991 estis ordinara tago en la ĉina socia vivo, tamen ĝi estis neforgesebla tago kun aparta signifo por iuj. Multaj beboj naskiĝis en tiu tago kaj komencis sian novan vivon. Multaj maljunuloj celebris en tiu tago sian arĝentan, oran aŭ diamantan jubileon, rememorante sian pasintan feliĉan vivon. Iuj riĉiĝintaj kamparanoj de landlimaj regionoj la unuan fojon venis en tiu tago al Pekino por ĝin viziti, kio donis al ili multe da novaj impresoj. Kaj pli da aliaj homoj havis neforgeseblan ĝojon aŭ ĉagrenon en tiu tago en sia laboro kaj vivo.

Ĝuste en tiu tago iuj fotistoj per siaj fotoaparatoj kaptis fragmentojn de la vivo unu post alia sur stratoj de Ĉinio suda, norda, orienta kaj okcidenta.

Avino kaj nepino





Metana cisterno en fabriko

Sinteza utiligo de metano en Ĉinio

de YANG SHIQING

METANO estas unu el la kompare bonaj biontaj brulaĵoj kaj bonkvalita sekundara energio. La materialoj por produkti metanon estas ĉie vidataj, kiaj brulligno, homaj kaj bestaj fekaĵoj, tigoj kaj folioj de vegetaĵoj. Oni produktas metanon per fermentigo de tiuj objektoj.

Lastatempe pro la serioziĝo de manko de energioj kaj polucio de la tuta mondo multaj landoj, precipe la disvolvigantaj landoj, turnis sian atenton al ekspluatado kaj sinteza utiligo de metano.


Ĉinio komencis utiligi metanon en la fino de la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento. Tiam plejparto de la ĉinaj urboj ne havis elektron. Oni utiligis metanon ĉefe por lumigi butikojn kaj templojn. De la 50-aj ĝis la 70-aj jaroj oni ekspluatis metanon por lumigo

kaj kuirado en la kamparo. Kaj en la 80-aj jaroj oni komencis utiligi ĝian akcesoran produktaĵon — anaerobian fermentaĵon produktitan dum la farado de metano. Post 10-jara esplorado oni jam malfermis novan vojon sinteze utiligi biontajn riĉfontojn kun metano kiel la ĉefa por disvolvi la kamparan ekonomion kaj plibonigi vivmedion de la kamparo kaj urbetoj.

Huangling-vilaĝo de la Jaŭ-nacia Aŭtonoma Gubernio de Guangxi en suda Ĉinio estis malriĉa montvilaĝo, kies loĝantoj suferis de nesufiĉaj manĝaĵoj kaj vestoj en longa tempo. En vintro de 1983 ili komencis sinteze ekspluati metanon kaj akiris bonan efikon post kelkvara penado.

Antaŭ ĉio ili popularigis utiligadon de metano, sunenergio, elektro, hidroenergio kaj energiŝpara

Kuirado per metano



Afrikanano en la Internacia Kurso de Metana Tekniko



kuirforno por solvi la problemon pri manko de energio. La vilaĝo nombras 107 familiojn. Tie estis 128 metanaj basenoj en 1986. Tio signifis, ke 97 procentoj de la familioj de la vilaĝo jam utiligis metanon. Se ĉiu baseno 6-8-kubmetra produktas 500 m³ da metano ĉiujare, do ĉiu familio povas ŝpari 2 000 kg da brulligno kun kosto de 400 juanoj (5.4 juanoj = unu USD) ĉiujare.

La ekspluatado de metano akcelis la disvolvigon de porkobredado. Oni prenis likvaĵon produktitan en metanfarado kiel aldonajon de la porkonutraĵo kaj tiel ŝparis po 60 kg da greno por ĉiu porko. Antaŭe la vilaĝo bredis sume 250 porkojn. Kaj post kiam la vilaĝanoj ekutiligis metanon, la nombro de ĉi tie bredataj porkoj kreskis al 600. Dank' al tio ĉiu familio plienspezis ĉ. 400 juanojn jare. Antaŭe en la vilaĝo ĉie malbonodoris fekaĵa likvaĵo elfluinta el porkaj staloj. Nun la porkaj staloj kaj necesejoj ligiĝas kun metanaj basenoj per kloako. La vivmedio de la vilaĝo multe pliboniĝis.

La vilaĝanoj kultivas 230 000 fruktarbojn. Kiam ili sterkas la fruktarbojn per la likva kaj solida fermentaĵo de metana baseno, la arboj donas fruktojn helkolorajn kaj grandajn kaj ilia produktokvanto pliiĝas. Post tempo de rizsemoj dum kelka tempo en la likvaĵo, la vivaj rizplantidoj plimultiĝas je 10 procentoj. Kompare kun la ordinara sterko el homaj kaj bestaj fekaĵoj la sterko el metana baseno ne nur estas pli efika, sed ankaŭ inhibicias fiinsektojn kaj malsanojn de rizplantoj, plibonigas la medion de la tero kaj altigas ĝian fekundecon.

La sukcesa sinteza utiligo de metano multe akcelas la ekonomian konstruadon de la kamparo de Gongcheng-gubernio. Nun ĝia grena produktokvanto kreskas jaron post jaro, la enspezo de ĝiaj loĝantoj rimarkinde pliiĝas.

Ĉinio komencis ekspluati kaj utiligi metanon en urbetoj kaj kamparo malfrue kaj malgrandskale, tamen en iuj lokoj oni jam akiris bonan efikon.

Nun estas prospera la afero de ekspluatado kaj utiligo de metano en la urbo Neijiang, Sichuan-provinco. Ĝis la fino de 1991 en la urbo stariĝis dek metanproduktaj konstruoj, kiuj ĉiutage traktas industrian organikan likvaĵon de ĉ. 1 500 m³ kaj produktas gason de 20 000 m³, per kiu oni provizas kelkajn fabrikojn kaj 800 familiojn.

La ekzemplo de Neijiang en ekspluatado kaj utiligo de metano malkovras la avantaĝojn de metano, kiam oni prenas ĝin kiel energion en urboj. Ĝi estas facile utiligebla, higiena, nepolucia, malmultekosta kaj bonefika. En Neijiang ĉiu familio elspezis nur 1 000 juanojn por instalati metanan fornon. La elspezo estis je 500 juanoj malpli alta ol tiu por munti naturgasan fornon. Tial la ekspluatado kaj sinteza utiligo de metano en la urboj, kie mankas energio, jam metiĝis en la tagordon.



Metano servanta al pumpmaŝino por irigacio

Nanyang de Henan-provinco nun faras projektaĵon por konstrui sin en la unuan "metanan urbon" en Ĉinio. La urbo havas 20 000 familiojn el 80 000 loĝantoj. Post penado de la urba administracio nun 1/3 de la tieaj loĝantoj utiligas metanon por kuirado kaj hejtado. Nun la gastuboj etendiĝas al ĉiuj anguloj de la tuta urbo kaj la "metana urbo" estas formiĝanta. ■

ABONTARIFO DE EPĈ

lando	Valuto	1 jaro
Aŭstralio	AUD	33.00
Aŭstrio	ATS	320.00
Belgio	BEF	936.00
Germanio	DEM	45.50
Britio	GBP	15.50
Finnlando	FIM	111.00
Francio	FRF	150.00
Italio	ITL	34000
Japanio	JPY	3600
Nederlando	NLG	51.00
Nov-Zelando	NZD	45.00
Svisio	CHF	39.50
Usono	USD	26.00
Kanado	CAD	30.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:		
	USD	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin- Ameriko:		
	USD	9.50



Hotelo Huanghai

Huanghai bonveni- gas vin!

de ZHANG QINGZHEN

LA hotelo Huanghai en Qingdao servos kiel kunvenejo kaj loĝejo de la esperantistoj partoprenantaj en la Kvina Pacifika Kongreso de Esperanto. Kia estas la hotelo? Kun tiu demando mi speciale vizitis ĝin.

La hotelo sidas ĉe la marbordo. Ĝi alfrontas la Flavan Maron kaj staras ĉe la piedo de verda monto. La helverda etaĝdomo de la hotelo sur la fono de la monto kaj maro aspektas kiel bela pejzaĝo.

Tio estas moderna sinteza hotelo en Ĉinio. Ĝi ekfunkciis en majo 1983 kaj estis renovigita en 1990. La konstruaĵo havas sume 21 etaĝojn. Enirinte la pordon vi venas en vastan kaj helan vestiblon. La kristalornamita lustro kaj la helverda marmora planko igas la lokon lukse brilanta.

Maldekstre de la vestiblo estas duetaĝa manĝejo, kiu donas pladojn de Shandong, Guangdong

kaj Sichuan kaj la eŭropajn manĝaĵojn. Ĉi tie kolektiĝas famaj kuiristoj. La restoracio de vivaj marproduktaĵoj, funkciigata de la hotelo Huanghai, sidas ĉe la orienta flanko de la Unua Marborda Banejo de la urbo. Ĝi kun granda marvivaĵa bredejo povas tutjare provizi la en- kaj eksterlandajn gastojn per pladoj de marvivaĵoj.


Dekstre de la vestiblo estas halo kun areo de ĉ. mil kvadrataj metroj. Sur la plafono brilas 200 rondformaj artaj lumigiloj kiel steloj en ĉielo. Vicĝenerala direktoro Li Jicheng diris al mi: "Tio estas la unua grandtipa plurfunkcia halo en Qingdao. Kaj ĝi servas por bankedo, amuzo, kunveno kaj aliaj."

La hotelo havas instalaĵojn, kiaj klimatiziloj, privata aŭtomata telefonio, karaoke-balo, sporthalo, saŭno, bilardejo, amuzejo, vendejo, banko, bufedejo, kafejo, kosmetikejo, ambulatorio kaj

marakva naĝejo.

De la 2-a ĝis la 19-a etaĝo ĉiu havas po 16 ĉambrojn, 2 apartamentojn kaj 1 kunvenejon. La

En la restoracio de la hotelo



ĉambroj estas bone meblitaj, puraj kaj komfortaj. En la etaĝdomo servas tri liftoj. La 20-a etaĝo konsistas el ripozejo kun delikataj lignaj mebloj, teraso kaj glaciaĵ-trinkejo kun triflankaj vitraj muroj. Nokte kiam vi suriras sur la terason kaj rigardas foren, vi povas vidi sennombrajn lamplumojn de la urbo. Tage, vi povas ĝui la senliman maron kaj la panoraman vidon de la urbo.

La hotelo Huanghai ĉiumonate akceptas pli ol 3 000 alilandajn gastojn. Pro la ĉiama kresko de la gastoj, la hotelo aldonis novajn instalaĵojn, kiuj multe levis la laborefikon. La hotelo instalas komputilojn en la ĝenerala servostando, kiuj faciligas serĉadon de gastoj laŭ nomo, ĉambra numero, ŝtataneco, laborunuoj kaj profesio.

En Qingdao, Huanghai ne estas la plej luksa hotelo kaj multe malpli luksa ol superluksaj hoteloj en Pekino kaj Kantono. Sed plej gravas ne la lukseco de hotelo, sed ĝia servo, la lasta estas plej atentata problemoj de gastoj. Tial, la hotelo prenas bonkvalitan servon kiel la unuan gravan laboron.

Mi klare memoris tion, kiam mi unuafoje venis en la hotelon. Mi kaj mia koleginino loĝis en la

ĉambro n-ro 19 de la 14-a etaĝo. Tuj kiam ni eniris la ĉambron, servistino donis al ni po tason da teo kaj varman lavtukon. Kiam ŝi vidis nian gaston, ŝi alportis pliajn tason da teo kaj lavtukon. Ŝia agrabla rideto tuj forpelis nian laĉigon de vojaĝo.

Oni sciigis al mi, ke la plejparto de eksterlandaj turistoj al Qingdao estas germanoj, tial la hotelo ofte ricevas leterojn el Germanio. Iu skribis al direktoro de la hotelo: "Mi tranoktis 20 tagojn en via hotelo kaj trovis, ke ĉiuj laborantoj de via hotelo ĝentile kaj afable servas al la gastoj, mi estis kvazaŭ en mia hejmo."


Mi demandis junan servistinon, ĉu ŝi ne opinias la regulojn de la hotelo tro rigoraj. Ŝi respondis: "Se vi amas tiun laboron, vi certe opinias la regulojn tre necesaj. Ekz. la hotelo difinis, ke la servistinoj devas paroli milde, iri leĝere kaj labori senbrue. Ĉu vi kontentus, se ni parolus malĝentile kaj laborus mallerte?"

Mi devas aparte menciigi, ke la laborantoj de la hotelo Huanghai simpatias Esperanton. Septembro 1990 la prepara kunveno de la Kvina Pacifika Kongreso de Esperanto okazis en Qingdao. Kiam


William R. Harmon, reprezentanto de la E-Ligo por Norda Ameriko, kaj Yosimi Umeda, antaŭa vicprezidanto de UEA, eniris en la hotelon kaj vidis horizontalan rubandon kun Esperantaj vortoj "Bonvenon al eksterlandaj esperantistoj!", ili emociiĝis de la sincereco de la esperantistoj de la Esperanta Asocio de Qingdao kaj la laborantoj de la hotelo. Anstataŭ fari registradon por sia enloĝiĝo, ili fotigis sin sub la rubando. Enirinte la ĉambrojn, ili trovis la bonvenigan leteron persone subskribitan de la ĝenerala direktoro de la hotelo kaj florbukedon. Estis neatendite por ili, ke en la ĉambroj estis Esperanta gvidilo pri servoj kaj telefonado. Ili opiniis, ke ĉio ĉi estis la plej granda kompreno kaj subteno de la hotelo al Esperanto, kaj ke la organiza komisiono saĝe difinis la hotelon Huanghai kiel loĝejon kaj kunvenejon de la kongresanoj.

Antaŭ la kongreso, krom fari ĉiajn preparajn laborojn por la kongreso, la direktoro kaj la laborantoj de la hotelo ankaŭ lernis Esperanton. Pli-ol-50-jara vicĝenerala direktoro Li ankaŭ diligente lernis Esperanton. Li diris: "Ni faros ĉion por ke la esperantistoj estu en nia hotelo samkiel en sia hejmo." ■

Restoracio de Vivaj Marproduktaĵoj Bailanghua



Vizito al Oostende



En la ceremonio de ĝemeliĝo de la urboj Qingdao kaj Oostende



S-ino Flory Witdoeckt (meze), urbestro de Oostende s-ro Julien Goekint (dekstre) kaj la aŭtoro.

La Ekspozicio de Ĉinaj Industriaĵoj kaj Produktaĵoj okazis de la 2-a ĝis la 9-a de oktobro 1991 en la urbo Oostende, Belgio. Ni, delegitoj de la Qingdao-a Esperanto-Asocio, partoprenis la ekspozicion. Kaj profitante la oka-

zon ni kontaktiĝis kun esperantistoj de la urbo kaj interŝanĝis opiniojn kun ili pri E-movado de Qingdao kaj Oostende. Post amikeca intertraktado la du asocioj ĝemeliĝis.

En printempo de 1990, kiam

geesperantistoj s-ino Flory WITDOECKT kaj s-ro Walter VAN DENKIEBOOM de Oostende vizitis Qingdao, ili jam proponis, ke la du E-asocioj ĝemeliĝu. Post tio ambaŭ asocioj faris preparajn laborojn. Ĉi-foje reprezentantoj de ambaŭ asocioj ĝoje renkontiĝis en Oostende. Post sincera amikeca intertraktado la du asocioj oficiale ĝemeliĝis en la 1-a de oktobro 1991. Ili subskribis amikecan kunlaboran interkonsenton, interŝanĝis Esperantajn flagojn kaj konsiliĝis pri organizado de karavano al Qingdao fare de la Esperanto-Asocio de Oostende por partopreni la 5-an Pacifikan Kongreson de Esperanto en 1992 k.a. La Esperanto-Asocio de Oostende donacis al la Qingdao-a Esperanto-Asocio speciale faritan artan teleron kun esperantaj vortoj "Oostende — Qingdao, la 1-an. okt. 1991".

La vizito donis al ni alian profundan impreson, ke Esperanto servis kiel nemankigebla komunikilo dum la ekspozicio. La urbestro de Oostende parolis flandralingve en la inaŭguro de la ekspozicio kaj kelkaj aliaj gravaj kunvenoj. Kiel komuniki lian paroladon al la ĉeestantoj nekompreneblaj flandralingvon? Oni nature prenis la plej bonan komunan lingvon Esperanto kiel interan lingvon. S-ro Raymond Wylleman, prezidanto de la Esperanto-Asocio de Oostende, esperantigis la parolojn de la urbestro. Kaj ni ĉinigi ilin el Esperanto. Dum la ekspozicio ĉiutage 2-3 esperantistoj de Oostende senpage servis al la ekspozicia grupo de Qingdao. Dank' al ili senĉese alvenis negocistoj por traktado. Tiele, ne nur solviĝis lingva problemo en la ekspozicio, sed ankaŭ plivastiĝis la influo de Esperanto.

Bona servo fare de la esperantistoj de Oostende en la ekspozicio signis iliajn sukcesajn aktivecojn en la E-movado. La asocio havas nur ĉ. 50 membrojn, tamen ili faris solidan laboron, ili ĉiuj kapablas aŭdi, paroli, traduki kaj verki en Esperanto. En ĝia esperanta kurso

(Daŭrigo sur p. 50)

ESP-NOVAĴOJ

● La 28-an de decembro 1991, en Xining, la ĉefurbo de Qinghai-provinco fondiĝis la Qinghai-a Esperanto-Asocio. Pli ol 100 esperantistoj de Qinghai ĉeestis la fondkunvenon. Ĝis nun jam estas 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj en Ĉinio, kiuj havas sian E-asociacion.

● La 15-an de decembro 1991, esperantistoj de Ŝanhajo, Yan'an de Shaanxi-provinco, Dongguan de Guangdong-provinco, Pinghu de Zhejiang-provinco kaj Yueyang de Hunan-provinco respektive okazigis kunvenon memore al la 132-a datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

● La 12-an de januaro 1992, okazis la plivastigita kunveno de la konsilantaro de la Esperanta Asocio de Handan, Hebei-provinco. En la kunveno oni diskutis pri la laborplano de 1992, elektis kaj honoris la elstarajn membrojn de la jaro 1991.

● Helpate de la Yan'an-a Esperanto-Asocio, Shaanxi-provinco, la Yan'an-a Pedagogia Instituto kaj la Yan'an-a Normala Lernejo funkciigis po unu Esperantan kurson. Entute 70 kursanoj el la nomitaj lernejoj partoprenis la kursojn. Yan'an estas "Sanktejo" de la ĉina revolucio. Antaŭ pli ol 50 jaroj tie viglis la Esperantomovado. En la Arta Instituto de Lusin, la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato kaj aliaj lernejoj funkciis E-kursoj.

● En septembro de 1991, la

Dolun-a E-Asocio kaj la Dolun-a Unua Mezlernejo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kune funkciigis Esperantan kurson. Cent instruistoj kaj studentoj de la nomita mezlernejo kaj aliaj mezlernejoj partoprenis la kurson. La kurso daŭros unu jaron.

● En 1991 estis la 90-a datreveno de la naskiĝo de profesoro Jaston Varinghien. La Libroservo de UEA speciale rekomendis al legantoj eseojn kaj originalan poemaron de Varinghien: "Lingvo kaj vivo", "Flustro", "Ni kaj ĝi", "Libro kaj amo", kaj "Beletro", ankaŭ aliajn du memoraĵojn "Esperantologio: julio de 1961" kaj "Li kaj ni".

● IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio), la plej vasta esperantista faka organizo, aliĝinta al UEA, intencas pligrandigi sian anaron en ĉiuj landoj; ĉefe tie estas ankoraŭ ne kunordigitaj aŭ izolitaj membroj fervojistoj. Ili varme invitas interesitojn kontakti la Sekretarion: d-ro Romano BOLOGNESI, Via Misa 4, 1 40139 BOLOGNA (Italio)

● Okaze de la IFEF-kongreso 1992 en Münster, Germanio la poŝtejo uzos specialan stampon. Ili eldonos specialajn pk kaj koverton.

● Dum 1992 la Venezuelo Esperanto-Asocio festos sian okdekjaran jubileon. VEA fondiĝis en la orienta urbo Maturin, kaj ĝia unua prezidanto estis Benito Lozada Azocar. Dum la jubilea jaro, la venezuela poŝtadministracio uzos specialan poŝtstampon, hispan- kaj esperantlingvan; Venezuelo Stelo, la revuo de la Vene-



Memoriga stampo por la Dua Ĉina Kongreso de Esperanto



Memoriga stampo de poŝtejo de Münster de Germanio

zuela Esperanto-Asocio, eldoniĝos per dika jubilea numero kaj la Festa Nacia Renkontiĝo okazos en Caracas (Karakaso) la 17-an kaj 18-an de oktobro 1992.

● En septembro 1992 la E-klubo "BUKOVINA", kiu fondiĝis en 1990 en Suceava de Rumanio, okazigos la unuan renkontiĝon de la fakuloj pri la komerco kaj industrio en Suceava. Inĝenieroj, ekonomikistoj, komercantoj, teknikistoj, laboristoj, k.t.p. dezirantaj kunlabori rilate al kreskigo de la varproduktado kaj disvendado per Esperantaj rilatoj petu detalojn al la adreso: Ing. Bodale Ionel STR Mesteacanului Nr.1 B1. 16 SC.

B AP 9 ET.11 RO-5800 Suceava Rumanio.

● De la 25-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1992, okazos internacia filatela ekspozicio en Ĉeĥo-Slovakio Federacia Respubliko omaĝe al 400-jariĝo de Jan Amos Komenský, "instruisto de nacioj" kaj iniciato de la ideo de la internacia lingvo. La organizantoj preparas kulturalan folkloran programon, vizitojn de la muzeoj ktp.

Esperantistoj kaj gejunuloj de la Perkutinstrumenta Grupo de la Japana-Korea Kultur-interŝanĝa Asocio



Mi kaj Verda Majo

En marto de la kuranta jaro estis la 80-a datreveno de la naskiĝo de Verda Majo, fama japana esperantisto, kaj januaro estis la 45-a datreveno de ŝia forpaso. Por rememori tiun elstaran internaciisman batalantinon, ni publikigas artikolon de s-ro Huang Nai, konsiliano de la Ĉina Asocio de Blinduloj kaj Surdamutuloj kaj membro de la societo "Amikoj de Esperanto".

La Red.

La propra nomo de Verda Majo estas Hasegawa Teru. En la 30-40-aj jaroj ŝi uzis Esperanton kiel armilon por malkaŝi kruelaĵojn de japanaj militaristoj, kiuj agresis Ĉinion. Kiel ŝia frua kunbatalanto, mi ofte rememoras tiujn tagojn, en kiuj ni kunestadis.

Aŭtune de 1936, en kunvenoj de ĉinaj esperantistoj, kiuj studis en Japanio, mi konatiĝis unue kun ĉina samideano Liu Ren. Tiam preskaŭ ĉiuj ĉinaj studentoj en Japanio sciis, ke Verda Majo amis Liu Ren malgraŭ opono de ŝia patro. Mi kaj Verda Majo unuafoje intervidiĝis en la 15-a de decembro 1936, kiam la Japana Esperantista Asocio okazigis en Tokio kunvenon por festi la 77-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. Oni diris al mi, ke ŝi estas unu el la elstarantoj de la japana proleta Esperantomovado ĉeestantaj la kunvenon kaj ŝi estas la plej juna el ili. Estas laŭdinde, ke Verda Majo partoprenis la movadon, ĝuste kiam ĝi estis en malfavora situacio.

Kiam finiĝis la kunveno, por eviti suspekton de policanoj, mi nur manpremis Verdanan Majon kaj adiaŭis ŝin. Rigardante la siluetojn de ŝi kaj ŝia edzo, mi pensis en mi, ke ili estas sinceraj internaciismaj geamantoj.

Mi daŭre lernis Esperanton ĉe

fama japana esperantisto Nakagaki Torajiro kaj fariĝis laboranto de la Esperanto-societo de ĉinaj studentoj en Japanio en la komenco de 1937 kaj respondecis pri lernado kaj edukado. Mi ne forlasis Esperanton pro aliaj laboroj, tial mi povis daŭre kontaktiĝi kun Verda Majo.

En la komenco de 1937 la japana registaro praktikis politikon subpremi la aktivadojn de la maldoktraj ĉinaj studentoj. La japanaj policanoj malpermesis progresajn gazetojn, arestis iliajn respondeculojn kaj elpelis ilin al ilia hejmlando. En tia situacio Verda Majo kaj Liu Ren decidis veturi al Ĉinio por dividi la suferon kune kun la ĉina popolo kaj batali por libereco kaj emancipiĝo.

Iun tagon, en kafejo de Japanio, Liu Ren emocie diris al mi, ke li kaj Verda Majo faris decidon, ke unue Liu Ren veturos al Ŝanhajo kaj poste venigos Verdanan Majon tien, post kiam li havos laboron.

Januaron de 1937, iuj esperantistoj okazigis malgrandan kunvenon por adiaŭi geedzojn Liu. Ties decido kaj agado ricevis varman subtenon de ĉiuj. Post kelkaj tagoj mi kaj Ding Ke, ĝenerala direktoro de la Esperanto-societo de ĉinaj studentoj en Japanio, akompanis Verdanan Majon al la kajo de

Yokohama por adiaŭi Liu Ren. Sur la kajo mi faris foton por ili: Liu Ren, sin apogante sur balustrado de la ŝipo, tenis koloran paperan bendon ĵetitan de ni kaj ni tenis la alian finon de la bendo sur la kajo kaj rigardis la ŝipon malrapide forlasanta la kajon. La bendo rompiĝis kaj falis en la akvon kaj la ŝipo malproksimiĝis iom post iom...

Tiutage Verda Majo parolis malmulte. Laŭ aspekto ŝi estis ne tiel emociita kiel Liu Ren, sed ŝiaj okuloj kaj mieno estis firmaj. Eble ŝi imagis venontan nekonatan vivon... Ŝi estis bone preparita por suferi kaj batali kune kun la ĉina popolo.

Tri monatojn post kiam foriris Liu Ren, laŭ la perfekta aranĝo de Ding Ke, Verda Majo forlasis siajn familianojn kaj patrujon por iri al Ĉinio.

Ŝi veturis al Ŝanhajo kune kun ĉina elmigrinto el Guangdong, kun lernejo-karto de la Orient-Azia Japanlingva Lernejo kaj en la nomo de lia parenco. Ŝi veturis per la sama ŝipo, per kiu Liu Ren veturis. Nenio okazos, se la ŝipo forlasos la havenon de Nagasaki. Mi kaj Ding Ke kaj alia Guangdongano, kiu lernis Esperanton ĉe Nakagaki, akompanis Verdanan Majon al la ŝipo. Ni venis al triaklasa

kajuto kaj rigardis, kiel Verda Majo kaj ŝia eskortanto aranĝis la liton. Plejparto de la kunvojaĝantoj estis ĉinaj elmigrintoj al Usono. Ĉar Verda Majo devis ŝajnigi sin ĉino, kompreneble ŝi ne povis paroli japane por ne malkaŝiĝi. Ni flustris al ŝi Esperante: "Mutigu vin!" Ŝi kapjesis kun firmaj mieno kaj okuloj, kiel en tiu tago ŝi adiaŭis Liu Ren. Tamen, imageble, ŝi estis ĝojega en la koro, ĉar post tri noktoj ŝi povis revidi Liu Ren... Ni adiaŭis Verdajn Majon, nur post kiam ni propraokule vidis, ke policano en civila vesto forlasis la ŝipon, kontrolinte la pasaĝerojn. Sur la kajo ni atendis ekveturon de la ŝipo. Por eviti alies atenton, ĉi-foje ni ne ĵetis koloran paperan bendon, sed kiam ni vidis Verdajn Majon iranta al balustrado de la ŝipo, ni kantis "La Espero" kaj "La Tagiĝo" foje refoje, ĝis la ŝipo forlasis la kajon.

Mi kaj Verda Majo interkonsentis pri revidiĝo en Ŝanhajo. Kaj post malpli ol kvar monatoj ni renkontiĝis en Ŝanhajo. Tamen en tiuj kvar monatoj estis multe da malagrabloj. Kelkajn tagojn post kiam Verda Majo forlasis sian landon, japanaj policanoj rimarkis, ke ŝi perdiĝis. Sekve ili spionis ĉie kaj pridemandis ŝiajn familianojn kaj ankaŭ kelkajn ĉinajn studentojn kun Ding Ke kiel la ĉefo eble pro tio, ke ili informiĝis pri ŝi. Tamen la stultaj policanoj pensis, ke ŝi ŝtele foriris pro amo. Post julio 1938 aŭdiĝis virina voĉo en radio kontraŭ la japanaj agresantoj. La policanoj neniam atendis, ke la mistera virino estas neniu alia ol Hasegawa Teru, kiu foriris sub ilia nazo. Tial japanaj policanoj pli serioze spionis la aktivadon de la ĉinaj studentoj. Ding Ke, Nakagaki Torajiro kaj Chun-Chan Yeh estis arestitaj unu post alia de la loka polico kaj poste ankaŭ mi kaj Li Yisan estis arestitaj.

Mi korespondis en Esperanto kun Verda Majo loĝanta en Ŝanhajo. Ŝi skribis al mi, ke ŝia edzo ne havas konstantan laboron kaj ŝi ankoraŭ ne trovis okupon kaj ili vivas malriĉe. Mi informis ŝin pri

la arestiĝo de Ding Ke k.a. kaj la aktivado de japanaj policanoj. Antaŭe mi jam ordigis objektojn en mia hejmo, sed senatente mi lasis en tirkesto paperon kun la adreso de Verda Majo skribita en Esperanto. Tiutage, kiam policano kaj lia helpanto pridemandis min, mi vidis sur tablo diversajn librojn, gazetojn, leterojn kaj manuskriptojn kolektitajn en mia loĝejo. Subite mi rimarkis la supre menciitan paperon kaj maltrankviliĝis. Post tagmanĝo, kiam ripozis la policanoj, mi serĉis en ĵurnaloj sur la tablo, trovis la paperon kun la adreso de Verda Majo, rapide taŭzis ĝin kaj metis ĝin en la zonan. Tiel interrompiĝis la rilato inter mi kaj Verda Majo, tamen evitiĝis multe da malagrabloj. Sed la japanaj policanoj asertis, ke Ding Ke, Li Yisan k.a. helpis Verdajn Majon foriri kaj sendis ŝin al internacia kunveno. Samtempe multaj ĵurnaloj de Japanio mensogis, ke ni sendis delegitojn al internacia kunveno gvidata de la Tria Internacio kaj ili kunportis gratulan leteron.

Post tri semajnoj mi estis kaŭcie liberigita dank' al helpo de japana amiko, tuj respondis al la alvoko de la Federacio de la Kulturaj Societoj de Ĉinaj Maldekstraj Studentoj en Japanio kaj estis preta reveni hejmlandon por partopreni en batalo kontraŭ la japanaj agresantoj. La 3-an de aŭgusto mi kaj multaj ĉinaj studentoj revenis al Ŝanhajo per ŝipo. Antaŭ kiam Japanio lanĉis agresan militon kontraŭ Ŝanhajo la 13-an de aŭgusto, mi dufoje vizitis Verdajn Majon kaj Liu Ren en ilia hejmo en la franca koncesiita kvartalo.

La unuan fojon mi donacis al ili vazon da misoo, kiun mi kunportis el Tokio. Ni kune prenis manĝon kaj manĝis misosupon en japana gusto. Evidente, Verda Majo ĝojiĝis pro la hejmloka supo. Sed kiam ŝi aŭdis, ke Ding Ke ne estas liberigita kaj ankoraŭ suferas pezajn batojn de japanaj policanoj, ŝi diris en Esperanto: "Mi havas teknikon, scias Esperanton kaj povas maŝinskribi." Ŝi montris tajpilon sur la skribotablo kaj diris: "Mi havas

maŝinon, ĝi estas mia batalilo kaj per ĝi mi servos al la kontraŭ-japana rezistmilito."

Verda Majo ne sciis la ĉinan lingvon kaj mensogis al siaj najbaroj, ke ŝi estas elmigrinta ĉino. Kvankam ŝi portis blunan ĉinan robon, tamen ŝia paŝomaniero estis diferenca. Tiam la urbanoj havis grandan nacian malamon kontraŭ Japanio. La singardema Liu Ren ne lasis ŝin iri sola sur strato por eviti eventualan okazaĵon. Ŝajne Verda Majo estis melankolia pro tia vivo. Mi nur povis konsoli ŝin, ke ŝi pacience atendu ŝancon. Ĉar ĵus komenciĝis la milito, multaj laboroj ne estis aranĝitaj.

Post la 13-a de aŭgusto mi ne renkontiĝis kun ŝi pro laboroj de la Nacisava Societo de Ĉinaj Studentoj Lernintaj en Japanio, kvankam ni loĝis en Ŝanhajo.

Poste mi venis al la revolucia sanktejo Yan'an. Dum 1939-1940 mi dediĉis plejparton de la postlaboraj horoj al la Esperanta laboro por helpi Zhuang Dong, respondeculon de la Yan'an-a Esperanto-Asocio. Dume mi ne korespondis kun Verda Majo, sed nur pere de aliaj salutis ŝin kaj informiĝis pri ŝi. Ekde la vintro de 1939 mi esploris la situacion de Japanio. Mi laboris same kiel ŝi por la kontraŭ-japana rezistmilito.


Nur post la Liberigo en 1949 mi aŭdis, ke ŝi mortis pro malfacila akuŝo en la nordorienta liberigita regiono. La informo tre malĝojigis min. Samideanino Verda Majo, dum la tuta vivo vi strebis al justo, vero kaj lumo. Vi plenumis vian promeson. Vi suferis kune kun la ĉina popolo kaj oferis vian karan vivon. Mi estas pli feliĉa ol vi, kvankam mi perdis nur miajn okulojn pro la nacisava batalo. ■

Solvoj por enigmoj pri vegetaĵoj

1. Maizoj
 2. Arakido
 3. Sunfloro
 4. Konvolvulo
-



S-ro Tao Changjun



Umea tekruĉo

Ŝtonaj kruĉoj de Tao Changjun

Fotoj de SHI SIWEI

CU orientanoj, ĉu okcidentanoj, ĉiuj havas la kutimon trinki teon. Estas tre diversaj tekruĉoj en la mondo, kiel terakotaj, oraj, arĝentaj, kupraj, stanaj, porcelanaj kaj fajencaj. Ĉinio havas la historion de miloj da jaroj en farado de teservico. Kun la progreso de la socio kaj evoluo de sciencoj kaj tekniko oni deziras tetrinkilojn el materialoj pli novaj, en plastiko pli gustoplena. Ĉina metiartisto s-ro Tao Changjun ne sekvis la tradician teknologion de tekruĉoj. Li skulptas tekruĉon rekte el ŝtono. Ĉar la de li uzataj ŝtonoj estas malvarmaj, nemasivaj kaj aerotralasaj kaj iuj el ili entenas etkvantajn elementojn utilajn al la sano, tial liaj ŝtonaj kruĉoj trovis ŝaton de tekruĉaj kolektantoj de diversaj landoj. En Singapuro kaj Malajzio liaj

kruĉoj estas rigardataj kiel valor-egaj kuriozaĵoj.

S-ro Tao Changjun, 36-jara, amas belarton jam en sia infaneco. Li diplomiĝis el la piktura kurso de la Ŝanhaja Jiaotong-universitato. Li estas lerta en olepentrado kaj artmetia projektado. Li opinias, ke por fari artmetiaĵon oni nepre devas konsideri la ĝeneralan efikon de projektado, precipe hodiaŭ, kiam la modernaj artmetiaĵoj iom post iom fariĝas praktike uzeblaj, estas nemankigebla la industri-projekta teorio ekzemple de antropologia inĝenierio. En la lastaj jaroj li povis bone kunigi projektadon kun arto en farado de ŝtonaj tekruĉoj.

Tekruĉo konsistas el buŝo, tenilo, korpo kaj kovrilo. Por fari ŝtonan kruĉon, oni, limigita je materialo, devas plene disvolvi

siajn imagipovon kaj kreivon. S-ro Tao Changjun lerte konformigis la projekton al la kvalito de ŝtono, kunfandas la tradician ĉinan stilon kun la moderna moda stilo kaj donas kiel eble plej tipan formon. Ekzemple, lia umea tekruĉo estas farita el malmola ŝtono, en formo de stumpo de maljuna umearbo ĉirkaŭvolvita de draĥo. Lia ŝtona monera tekruĉo vidigas la ĉefajn monerojn de diversaj dinastioj de Ĉinio, kiuj bonorde viciĝas unu apud alia. Sur la kruĉo troviĝas konkaj moneroj, moneroj en formo de ŝovelilo kaj glavo kaj rondaj moneroj kun kvadrata truo en la mezo. La diversaj antikvaj moneroj montras la longan historion de la socia evoluo. Tre ĉarma estas lia narcisa tekruĉo. Ĝia korpo havas formon de narcisa bulbo, ĝian buŝon formas bulbito el la bulbo, kaj la tigo kun



Bambua tekruĉo

folioj kurbiĝas kaj falas formante la tenilon. Dum la kovrilon formas la supro de la bulbo, kie elkreskas tigoj kaj folioj. Estas tre interesa lia bambua teservico. Je la unua vido oni vidas nur unu kruĉon. Sed kiam oni demetas ĝian supran parton, malfermas la malgrandan kovrilon ĉe la supro, kaj trovas ene kvar malgrandajn tasojn. Tiam la supra parto fariĝas malgranda pleto, kaj kiam oni enmetas teon en la kruĉon kaj enverŝas varman akvon, la pleto servas kiel kovrilo de la kruĉo.

La ŝtonaj kruĉoj de s-ro Tao Changjun estis eksponataj en Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj urboj kaj trovis ŝaton de la rigardantoj. Oni laŭdis, ke liaj artaĵoj estas novaj floroj de la ĉina te-kulturo. ■

Monera tekruĉo



Narcisa tekruĉo



SHI PING:

Chen Zhangliang, reformisto por novaj varioj de plantoj

VESPERE de la 28-a de oktobro 1991, en la stabejo de Unesko en Parizo ektondris manklakado de la ĉeestantoj, post kiam la ĝenerala direktoro de Unesko deklaris aljuĝon de Gaved Hussain-premio por Junaj Sciencistoj por 1991 al ĉina profesoro Chen Zhangliang.

La premio, titolita "Nobel-premio por Junuloj", estas la plej alta premio por junaj sciencistoj kaj ĝia aljuĝo okazas en ĉiu dua jaro. En 1991 la elektadon partoprenis kandidatoj el pli ol 140 landoj kaj regionoj, kaj 7 sciencistoj, kiuj gvidis la ĉi-fojan elektadon, unuanime aljuĝis la premion al Chen Zhangliang per baloto.

"Saluton, mi estas Chen Zhangliang," kiam profesoro Chen sin prezentis en la ĉina komuna parollingvo kun iom da dialekto de Fujian-provinco, mi ne povis kredi miajn okulojn: li estas tiel juna, nur 31-jara, kun nigra, iom krispa hararo, maldika vizaĝo kaj 1.84-metra alto. Li portis turismajn ŝuojn kaj jakon kaj aspektis firma kaj sperta.

Multaj diris, ke Chen Zhangliang estas fortuna. Fakte malriĉo kaj malfeliĉo ĉiam akompanis lin en lia infaneco. Li naskiĝis en malgranda vilaĝo de fiŝistoj



Prof. Chen Zhangliang

ĉe la marbordo de sudorienta Ĉinio. Liaj gepatroj estis analfabetoj. Li estis malsanema kaj konfidita al parenco, kiam li estis apenaŭ 1-jara. Liaj gepatroj ne havis monon por vivteni lin, por ne paroli pri kuracado de lia malsano.

"Tiam mia familio estiĝis tre malriĉa," li diris. "La gepatroj ofte diris al mi, ke ni malriĉuloj devas esti honestaj kaj neflekseblaj, eble tiu vorto estis la ununura posedaĵo, kiun la familio donis al mi." Kun ĝi Chen Zhangliang iris paŝon post paŝo de la kota kampa vojeto al la mondo.

Chen Zhangliang ekvizitis ler-

nejon, kiam li estis 9-jara. Same kiel infanoj de aliaj kamparanoj, ĉiutage li devis okupiĝi pri fiŝado aŭ kamplaboro post lernohoroj. Tamen la obstina infano kaptis ĉiun minuton por lerni. Kun stipendio kaj ĝuo de rabato de lernokotizo li finis la lernadon de elementa ĝis alta lernejoj, kaj en 1983 li sukcese trapasis la ekzamenon por lerni kiel esplor-studento en la biologia kaj medicina fakoj de la Universitato de Vaŝingtono en Usono.

En la komenco, post kiam li venis en Vaŝingtonon, li trovis, ke lia klereco kaj lia nivelo de la angla lingvo estis tre malaltaj kompare kun tiu de la alilandaj studentoj el famaj altlernejoj.

Post unujara persista lernado Chen Zhangliang publikigis sian unuan disertacion en la univesitata periodaĵo "Eŭropa Molekulologia Studo", kio vekis vastan atenton de la internacia biologia kampo. En 1987 li trovis kaj pruvis la ekziston kaj funkcion de DNA, kiu reguligas la maturiĝon de vegetalaj embrioj. Alilandaj fakuloj nomis lian trovon mejloŝtono de esplorado de vegetalaj molekuloj. En junio de la sama jaro per plej alta noto li akiris diplomon pri doktoreco je unu kaj duona jaroj pli frue. Ĉe lia diplomitiĝo multaj universitatoj kaj grandaj kompanioj de Usono volis dungi lin per alta salajro, li tamen senhezite revenis patrolanden. Li venis en la Pekinan Universitaton kaj komencis penigan pioniran laboron.

La laboratorio, kie Chen Zhangliang esploras proteinan inĝenierion kaj inĝenierion de vegetalaj genoj, sidas ĉe Weiming-lago en la Pekina Universitato. La lago spegulas la pagodon, birdoj kantas sur arboj kaj floroj aromas, kaj pro tio li ŝatas la lokon. Por esplori genan inĝenierion, li aplikas metodon laŭbezzone tondi genetikajn genojn kaj kunigi ilin ekster la korpo de kreskaĵoj, poste enmeti ilin en ilian korpon por ilin reprodukti kaj refunkciigi kaj finfine akiri novajn variojn aŭ novajn produktaĵojn; t.e., oni povas projekti kaj



S-ino Cao Min, ĝenerala direktorino de la kompanio

Modaj fasonoj de Moniza

Teksto de DA WEI

Fotoj de CAI HAIFENG

EN Pekino estas Akcia Modvesta Kompanio Moniza investita de Pekino, Hongkongo kaj Aomen. La kompanio okupiĝas kaj pri produktado kaj pri vendado. La publiko estas altirata de ĝiaj vestoj de modaj fasonoj. La nunā Moniza, kiu havas 9 ĉenbutikojn en Pekino kaj 13 ĉenbutikojn en aliaj urboj kaj unu fabrikan, disvolviĝis el malgranda butikoj. La vestoj de la kompanio estas tre bonvenaj pro sia ŝikeco kaj eleganteco.

SPECIMENO ELPETITA

Enpaŝante en la centran debitejon de Moniza, oni tuj sentas agrablecon. La dekoro en la delikate

bonodoranta butikoj baziĝis sur blanka fono. La duonrondaj bretaroj estas tre oportunaj por pririgardo kaj elektado de la klientoj. En la butikoj kun areo de 200 kvadrataj metroj vidiĝas vestoj de pli ol cent fasonoj. Gvidistinoj kun ruĝa rubando ĉirkaŭ la torso akceptas kun granda afableco.

Gvidistino kun dolĉa voĉo diris al mi, ke la vestoj de Moniza estas altklasaj kaj mezklasaj, kvankam la prezoj estas relative altaj, tamen vestoj de multaj bonaj fasonoj estis elĉerpitaj en unu tago, kaj eĉ specimenoj en vitrinoj estis elpetitaj.

La centra debitejo de Moniza havas sian lokon sur la kvara etaĝo de la Pekina Magazeno, unu el la

plej grandaj vendejoj en Pekino. En Ĉinio la novedzinoj kutime portas ruĝajn vestojn. Sed antaŭ nelonge Moniza prezentis rozetan kostumon por novedzino, kaj multaj homoj vicatendis por aĉeti kostumon de tiu fasono. Centoj da kostumoj estis elĉerpitaj en mallonga tempo. Estis elpetita ankaŭ la specimeno portata de gvidistino.

NUR TRI MODFASONISTOJ

La kompanio havas 215 laborantojn kaj nur 3 el ili estas modfasonistoj. Ĉiuj fasonoj de la kompanio estas pruvo de iliaj talento kaj kreiveco.

S-ino Lü Lan, gaja kaj serena, estas ŝerce nomata de siaj kolegoj "kaprica" modfasonistino. Ŝi oku-

krei novajn vegetalajn variojn en mallonga tempo en laboratorio, sen observi naturan evoluon en miloj kaj dekmiloj da jaroj. Per tia biotekniko oni povas levi la produktokvanton kaj kvaliton de estaĵoj kaj fari specifajn medikamentojn. Tial ĉiuj landoj prenas tian esploran metodon kiel la unuan celon por disvolvi la altnivelajn teknikojn kaj antaŭdiris, ke la 21-a jarcento estos biologia jarcento.

Chen Zhangliang volas rapide popularigi en Ĉinio la avangardajn

teknikojn, kiujn li lernis en Usono.


En sia laboratorio Chen Zhangliang unue sukcese klonis krusto-proteinajn genojn de viruso, kiu influas la produktokvanton kaj kvaliton de tabako, metis tiujn genojn en tabakon kun orienta aromo, elkulturis aroman, bonkvalitan kaj virusimunon specon de tabako "PK-873" kaj faris eksperimenton en 133 hektaroj da kampoj. Fakuloj diris post ekspertizo, ke la produktita tabako jam atingis la nivelon de importita bonkvalita

tabako. Poste Chen Zhangliang trovis ian bakterian proteinion, kiun li nomas "Kontraŭbakteria Peptido" kaj kiu povas efike kuraci iujn gravajn malsanojn de rizplantoj. La disvastigo de tiu scienca atingo povas levi la produktokvanton de rizo je 10%.

"Nia lando estas ankoraŭ malriĉa kaj multaj aferoj estas farendaj por ni en la scienca kampo. Por ke nia lando riĉiĝu kaj povu firme stari en la mondo, ni devas serioze fari nian laboron." Jen deziro de Chen Zhangliang. ■



Verko de Lū Lan



En butik de la konfekcia kompanio Moniza





Verko de Liu Ping



Verko de Wang Baoyuan



En mendokunveno



piĝis pri vestofarado por dancistoj kaj filmaktoroj kelkajn jarojn, tial ŝiaj verkoj ĉiam impresas per artisma klereco. En 1987 ŝi faris nokto-kostumon, kies jaketo estis farita el bukedo da silkaj floroj. La verko akiris la unuan premion de la Tria Konkurso de Lastmodaj Fasonoj de Ĉinio.

En la lastaj jaroj la stilo de Lū Lan fariĝis pli kuraĝa, pli lakona kaj pli libera. Foje ŝi projektis senkoluman virinan mantelon kun nur unu butono. Oni timis, ke tia mantelo ne havos grandan debiton. Sed fakte knabinoj montris grandan intereson por tiu fasono. Poste la fabriko produktis nombron da tiaj manteloj kaj ĉiam havis bonan debiton. Lū Lan opiniis: "Verko de modfasonisto ne estas sola sinmonstro de li mem, ĝi devas esti ankaŭ komunikilo. Verko prezentanta deziron de malsamaj klientoj estas plej sukcesa."

Juna s-ro Liu Ping estas kvieta kaj silentema, sed lia talento en desegnado, projektado, ŝablonfarado kaj kudrado estas admirata de liaj kolegoj. Estas granda plezuró legi kolekton de liaj desegnaĵoj, en kiuj la mieno kaj karaktero de manekenoj estas vive desegnitaj. Liu Ping ŝatas projekti virinajn kostumojn. Li diris: "Mi ŝatas la belecon kaj graciecon de virinoj." La rozeta kostumo por novedzino,

kiun mi menciis supre, ja estis lia verko.

En 1985, la festa kostumo kun nacia gusto, projektita de Liu Ping, estis aljuĝita al la unua loko de la Dua Kultura Premio de Lastmodaj Fasonoj de Ĉinio. Li bone memoras, ke li estis emociita, fiera kaj krom tio li ekpensis la patrinon, kiam li iris sur la podion por akcepti la premion. Li havas 5 pliaĝajn gefratojn kaj li estis plej multe zorgata de la patrino. Ŝi bone komprenis lin kaj ofte akompanis lin ĝis noktomezo, kiam li devis fari vestojn.

S-ro Wang Baoyuan fariĝis modfasonisto post sia ekfunkcio en la kompanio. Li ja ekŝatis vestofaradon en knabeco. Foje, kiam li estis mezlernejano, li kaj liaj kamaradoj ŝtele iris naĝi. Sed ili ne havis bankalsonon. Li do faris por ĉiu kamarado po kalsoneton el kelke da triangulaj tukoj. Jen lia unua verko. Dank' al sia diligenteco li havis sian lokon en la modfasonista rondo. Li diris: "Mi dediĉis mian tutan amon al mia afero."

NOVA FASONO POR ĈIU TAGO

En 1990 kaj 1991 la kompanio prezentis entute 830 fasonojn, meznombro unu fasono por ĉiu tago.

En 1990 la ĉina merkato ne estis vigla, kaj la staploj de multaj gran-

daj kaj mezgrandaj entreprenoj estis plenaj. Sed la kompanio Moniza havis neniom da stoko en sia tenejo. Ĝia ĝenerala direktoro s-ino Cao Min malkovris la sekreton, ke la sukceso de la kompanio dependis de senĉesa novigo de la fasonoj.

En la lasta septembro okazis la Unua Konfekcia Festivalo en la Pekina Magazeno. La vendokvanto de Moniza estis duoble pli granda ol tiu de ĉiuj aliaj 256 vestofabrikoj. Post nelonge la vestoj de la kompanio estis aljuĝita de la Tekstila Ministerio de Ĉinio al unu el dek plej famaj markoj de vestoj en nia lando.

DIREKTORO EL INSTRUISTINO

S-ino Cao Min portas malstrik-tan jakon kaj maŝintrikitan pantalonon. Kvankam mezaĝa, ŝi restas tre energia. Ŝi estas afbla, sed ankaŭ aŭtoritata en sia kompanio. Antaŭ tri jaroj ŝi estis ordinara instruistino de tajloraj lernejo.

Ŝi fondis kaj prosperigis la kompanion. Ŝi finis varbadon kaj ĉiujn preparojn por ekfunkcio de Moniza en 40 tagoj. Por oferti produktaĵojn de sia kompanio, ŝi kaj la vicdirektoro kune veturis per triciklo al la Pekina Magazeno por lui standon tie. Sed iu direktoro pri vendado de la magazeno rifuzis kategorie: "Ni ne havas vakan spacon eĉ por famaj produktaĵoj, por ne paroli pri la viaj." Sed en du jaroj la kompanio elturnis sin el malfacila situacio kaj okupis la unuan lokon en vendokvanto ĝuste en la Pekina Magazeno. En la kunveno por atribui premiojn, la modelinoj de la kompanio prezentis multajn modajn fasonojn de Moniza, kaj la strebema kaj memfida s-ino Cao Min larmis de ĝojo.

Daŭre teni la famecon estas pli malfacile ol krei ĝin. S-ino Cao Min bone scias, ke la kompanio frontos pli intensan konkurencon. Sed ŝi firme kredas, ke ŝi ne malsukcesos, se ŝi persistos en la principo "ne sekvi alies faron, nek sin ripeti". ■

Kreado de nova fasono



YE QIANYU, “MAKISANO” EN LA ĈINA PENTRISTA RONDO

de CHEN SI

S-RO Ye Qianyu aĝas 85 jarojn kaj ĝuas altan renomon en kaj ekster la lando. Sed li humile nomas sin “makisano”. Li motivis sian titolon unue per tio, ke li estis memlernanto kaj neniam lernis en oficiala belarta instituto, kaj due, ke lia stilo de la pentrado estis liberigita de ajna rutino. Ĉe la komenco de printempo mi vizitis lin en lia pentroĉambro.

Li estas sana kaj bonhumora. Li portis ĵerzon el lanoj de ankara leporo, bluan pluman veŝton kaj grizan pantalonon. La arĝentaj kapharoj kaj la zorge tonditaj grizaj lipharoj harmonie kontrastis sur la fono de la malhelaj koloroj de la vestoj. Lia vestado impresas kiel lia pentrado. Li pentris senhaste, parolis ne rapide nek lante. En lia aplomba konduto bone malkaŝiĝas lia penado en artismo.

En 1907 s-ro Ye Qianyu naskiĝis ĉe la pitoreska Fuchun-rivero en Zhejiang-provinco. Pro malriĉeco de la familio li neniam lernis en oficiala pentrarta lernejo. Sed en lia hejmloko nomata “lando de silko”, multaj familioj okupiĝis pri brodado. Lia patrio bone pentris kaj brodis, kio vekis lian intereson je pentrado. En 1926 Ye Qianyu ĉesigis sian lernejan vivon kaj sin dungis al iu teksfabriko por pentri reklaman bildon.

La pentrista kariero de s-ro Ye Qianyu komenciĝis per pentrado de karikaturado. En 1927 li komencis karikaturan serion “S-ro Wang” por ŝanhaja ĵurnalo. Per la karikaturo serio li humure prezentis la ĉiutagan vivon de ordinaraĵoj de Ŝanhajo kaj fariĝis fame konata karikaturisto.



S-ro Ye Qianyu

En 1943 li ĉesis pentri karikaturon kaj komencis pentri homojn en ĉinstila pentrarto. Tiujare li vizitis Hindion. Li estis ravita de la naciaj dancoj de hindoj. Reveninte hejmen, li sin fermis en sian ĉambron kaj kreis multajn pentraĵojn pri la hindaj dancoj. Tiuj pentraĵoj portis al li la renomon en la ĉina pentrista rondo.

Li estas eminenta pentristo de karikaturado, skizo kaj teatraĵoj. Oni povas diri, ke li komencis sian pentristan karieron je karikaturado, multe sin lertigis pere de skizo kaj brile sukcesis en pentrado de teatraĵoj. La figuroj en liaj pentraĵoj impresis kiel vivaj kaj ĉiuj figuroj estis flulinie desegnitaj je siaj plej belaj pozoj. Li akcentas mienon de la tuta figuro neglektante detalan desegnadon de ĉiuj apartaj korpopartoj. Li estas ŝpara je linioj en la desegnado. Se unu linio sufiĉas por bildigi la mienon, li neniel faras la duan linion.

Lia sukceso dependas ne nur de lia diligenteco, sed ankaŭ de lia sinteno al la vivo. Liaj proksimuloj diris, ke li havas la karakteron de taoista grandanimeco kaj konfuceana diskreteco de la ĉina tradicia kulturo. Eble ĝuste pro la grandanimeco li ne sin katenis en la arta stilo, kaj pro la diskreteco li ne estis tiel sovaĝa kiel vera makisano.

En la fino de 1991, helpate de la disĉiploj, la altrespektata majstro, eksdekano de la fakultato de ĉinstila pentrarto de la Centra Belarta Instituto de Ĉinio, eksponis siajn verkojn faritajn en la lastaj jaroj. Pentroamatoroj prenas viziton al la ekspozicio kiel grandan plezuron, kaj la nomo Ye Qianyu longe restis sur la buŝo de la pekinanoj. ■


西藏高原之舞

一九六〇年 潘平



"Gojaj tibetanoj"





"Danco kun ruğa rubando"



"Tibeta danco"


"Hinda tamburisti-no"



KURANTAJ AFEROJ

POLITIKO

● La eldonkvanto de “Elektitaj Verkoj de Mao Zedong” el 4 volumoj de la dua eldono superis 10 milionojn da kompletoj en 1991. “Mao Zedong en Ĉinio”, “15 Jarojn ĉe Mao Zedong”, “Biografio de Mao Zedong” kaj aliaj libroj pri la vivo de Mao Zedong havas grandan debiton.



En la Pekina Kontrol-stacio de Marsatelitoj de Ĉinio

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La 28-an de decembro, 1991, en la satelitanĉejo, Xichang, Sichuan-provinco, Ĉinio lanĉis telekomunan sateliton faritan de Ĉinio mem, per la transporta raketo Changzheng n-ro 3. Pro antaŭtempa estingiĝo de la fajro de la motoro, la raketo ne eniris en la difinitan orbiton, tamen la satelito mem portas fuzaĵon, kiu sufiĉas por plurjaraj sciencaj eksperimentoj de la satelito en la spacego.

Sciencistoj analizis la telemezuritajn datenojn kaj certiĝis pri la kaŭzoj de la perturbo. Krome la Pekina Kontrol-stacio de Marsatelitoj de Ĉinio fiksas la sateliton super la pacifika ekvatoro ĉe la easta longitudo de 178 gradoj. La satelito jam komencis sian internacian komunikadon. Jen la ĉina kosmonaŭtika kontrola sistemo oficiale komencis sian internacian servon.

● S-ino Jin Qingmin, vicprofesorino-esploristino de la Antarkta Esplorcentro sub la Nankina Geomineralogia Instituto, kiu trifoje faris sciencajn esploradojn en Antarkto, diris en sia raporto, ke antaŭ ĉ. 200 milionoj da jaroj la antarkta kontinento estis ĉe la ekvatoro, kie estis prosperaj arbaroj kaj tre multaj animaloj. Pro la

terkrusta movado, ĝi apartiĝis de Gondvana tero (*Gondwana land*) kaj havis la nunan stacion.

● Antaŭ nelonge Ĉinio elfaris modernan idealan trafikilon — magnetan flosan trajnon. Laŭ plano antaŭ la fino de 1995 oni elfaros specimenon.

La senrada magnetata flosa trajno estas movata de linia motoro. Pere de magnetata forto ĝi veturos je 10 mm super la relojn.

● Tri aviad-amatoroj de la urbo Baoji, Shaanxi-provinco, post 2-jara penado faris ultraleĝeran aviadilon kaj sukcese provflugis. Tio estas la unua ekzemplo en Ĉinio, ke privatuloj mem faris aviadilon.

MALPEZA INDUSTRIO

● La kosmetikajoj kun marko Dabao, produktitaj de Sanlu-fabrikejo, Pekino, konsistas el 5 serioj el cent specoj, t.e. harprotektaj, haŭtprotektaj, beligaj, lavaj kaj parfumaj, ili ĉiuj estas faritaj el ĉinaj herboj. La kosmetikajoj akiris plurfoje premiojn en la mondo.

En 1991 produktaĵoj de la fabrikejo eksportiĝis al 27 landoj kaj regionoj. Antaŭ nelonge Sanlu-fabrikejo komencis helpi Bangladeŝon en konstruo de fabrikejo de kosmetikajoj kaj 31 specoj da produktaj teknikoj kaj ekipaĵoj eksportiĝos al Bangladeŝo, kio markis la finon, ke Ĉinio nur importis kosmetikajojn kaj ne eksportis ilin.

MEDICINO

● La Ŝanhaja Dua Medicina Universitato elkulturis specialan specion de muso, kiu povas anstataŭi la homajn korpojn en eksperimento pri aideso kaj viruso de hepatito B. Tiaj musoj havas plurajn imunomankojn, kaj eksperimentado sur ĝi anstataŭ sur homa korpo ebligas observadon de la patogenaj kaŭzoj kaj ĝustan elekton de medicinaĵoj, pro tio tiu scienca frukto estas grava por baza imunologio kaj klinika kuracado. Ĝi markis, ke Ĉinio akiris gravegan progreson en la homa biologio.

● Surbaze de enkondukita tekniko la Unua Farmacia Fabrikejo de Suzhou, Jiangsu-provinco de Ĉinio, produktis urinoskopian lakmuson URO, per kiu oni povas ekzakte konstati en unu minuto la sanstaton de la homaj renoj, hepato kaj urina sistemo.

ARTOJ

● S-ro Li Qici, majstro de mikrogravuro de Yuyao-gubernio, Zhejiang-provinco, faris mikrogravuraĵojn kun portretoj de 100 fa-



maj kulturaj personoj de la mondo. Per tiu verko li akiris premion de eksterordinara sukceso en la 5-a Usona Inventista Jarkunveno, okazigita en Los-Anĝeleso.

La 100 portretoj estas sur eburo granda kiel riz-grajno. Sur la malgranda eburo vidiĝas versimilaj portretoj de Konfuceo, Zu Chongzhi, Lusin, Ŝekspiro kaj aliaj. La gravuraĵo estas rigardata sub mikroskopo 200 fojojn pligrandiga.

- La Miluo-a Artmetiejo de Hunan-provinco faris gigantan feran bildon "Turo de Yueyang". La bildo 10 m longa kaj 5.8 m alta konsistas el miloj da pecoj.

ARKEOLOGIO


- Por protekti freskojn en antikvaj tomboj de Ĉinio, establiĝis en la urbo Xi'an la unua moderna konservejo de freskoj el antikvaj tomboj.

La konservejo situas subtere de la eksponejo de la Shaanxi-a Historia Muzeo, la ŝtata muzeo konstruita antaŭ nelonge. La konservejo kun totala areo de 1 200 kvadrataj metroj konsistas el tenejoj granda kaj malgranda kaj restituejo. La humideco kaj temperaturo estas samaj kiel en la antikvaj tomboj. La tenejoj estas prilumataj sen ultraruĝaj kaj ultravioletaj radioj.

INTERESAĴO

La unua jaguaro naskiĝinta en Ĉinio ekhavis mamnutron de hundino, ĉar ĝia patrino perdis mamnutran povon pro cezara operacio. Bredisto elektis el 10 mamnutrantaj hundinoj blankan por nutri la jagaron. La bredisto forprenis unu el la novnaskitaj hundidoj, kies hararo tre similas al tiu de la jaguaro,

En la analizejo de la Pekina Kosmetikaĵa Fabriko Sanlu



Ili sukcese elkulturis specialan specion de muso.

La fera pentraĵo "Turo de Yueyang"




por ke la hundino mamnutru la jagaron anstataŭ sian filon. La jaguaro estas tre kvieta kaj vivas pace kun la hundino.

Novnaskita jaguaro kaj mamnutranta hundino



Sutro-presejo en Dege — tibet-nacia kultura trezorejo

Fotoj de WU XINHUA



Konservejo de kliŝoj

La sutro-presejo konstruita en 1729 situas en Dege-gubernio de la Garze-a Tibet-nacia Aŭtonoma Subprovinco, Sichuan-provinco. Ĝi estas la plej granda sutro-presejo en tibet-naciaj regionoj. Ĝi famiĝis pro konservado de granda nombro da eldonaĵoj kun riĉa enhavo. Tie konserviĝas centoj da libroj, kiaj "Kanjur", "Danjur" kaj "Plena Verkaro de Congkapa", pri budhismo, historio, medicino, filozofio, astronomio, literaturo, muziko, metiarto k.a. Inter ili "La Origino de la Hinda Budhismo" estas tre rara en la mondo, ĉar ĝia eldono jam antaŭlonge perdiĝis en Hindio, la naskiĝloko de budhismo. La regantoj de Dege de ĉiuj dinastioj permesis al ĉiuj religiaj skoloj ekzisti kaj disvolviĝi en la loko, tial la presejo konservis kaj presis diversaskolajn sutrojn kaj verkojn, kaj tiel ĝi fariĝis trezorejo por prifosi kaj studi la tradicion tibet-nacian kulturon. En la presejo oni klare kaj ĝuste gravuris sutrojn kaj la kliŝoj estis bone faritaj kaj povis esti longe uzablaj. La eldonaĵoj de la presejo grandnombre vendiĝis en Tibeto kaj tibet-naciaj regionoj de Sichuan, Qinghai, Yunnan kaj Gansu kaj ankaŭ en Hindio, Nepalo, Bhutano kaj Japanio.

La presejo estas unu el la gravaj historiaj restaĵoj protektataj de la ŝtato. Lastatempe la registaro asigis grandan monsumon al ĝia riparo.





Sutroj presitaj



Kliŝofarado

Gubernio Dege, kie estas la sutopresejo

Presejo



KIOM DA FERVOJOJ ĈINIO HAVAS?

Ĉinio ekkonstruis fervojon je duonjarcento malpli frue ol Eŭropo. La unua ĉina fervojo Wusong (Ŝanhajo) kun longo de 14.5 kilometroj inaŭguriĝis la 1-an de julio 1876 kaj mal-konstruiĝis post 16 monatoj. En majo 1881 oni komencis konstrui fervojon inter Tangshan kaj Xugezhuang, kiu longis 9.7 kilometrojn, kaj ĝi estis transdonita al trafiko je la 8-a de novembro samjare. Ĝis la fino de 1948 Ĉinio havis 24 900 kilometrojn da fervojoj. En la daŭro de 73 jaroj ĉinoj konstruis meznombre 341 kilometrojn da fervojoj jare.

Pro la detruo de militoj funkciis nur 11 000 kilometroj da fervojoj en 1949. En la pasintaj 42 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko la ĉina registaro konstruis 52 trunkajn kaj 153 branĉajn fervojojn. Ĝis la fino de 1989 Ĉinio havis 53 186.5 kilometrojn da funkciaj fervojoj. De 1949 ĝis 1989 la longo de la funkciaj fervojoj kreskis je 31 376.6 kilometroj.

La supre menciitaj fervojoj sub la unuigita administrado de la centra registaro estas rete interligitaj kaj kondukas al diversaj lokoj de la lando.

Krome, en Ĉinio estas ankaŭ aliaj tri specoj de fervojoj: lokaj, minejaj kaj arbaraj.

La totala longo de la ĉinaj fervojoj de ĉiuj specoj en 1986 estis 88 288 kilometroj kaj la totala trakolongo — 137 549 kilometroj.

ŜANĜIĜO DE ĈINAJ URBOJ

En la pasintaj pli ol 40 jaroj grandaj ŝanĝiĝoj okazis al la ĉinaj urboj.

De 1979 ĝis 1990 aperis en Ĉinio 274 novaj urboj. Nun Ĉinio havas 467 urbojn, je 335 pli multe ol en 1949. Ĝis la fino de 1990 Ĉinio havis 181 urbojn en la provincoj ĉe la orientaj marbordoj, 193 en la centra parto kaj 93 en la okcidenta parto. Iom post iom raciigis la dispozicio de la urboj.

Transformante la malnovajn konsumajn urbojn, Ĉinio konstruis ilin en centrajn urbojn, kiu ludas gvidan rolon en la nacia ekonomio

kaj socia disvolviĝo, laŭ malsamaj kondiĉoj naturaj, historiaj, sociaj kaj ekonomiaj. Pli kaj pli perfektigis la funkcioj de la urboj. Krome, iom post iom raciigis la skalo de la urboj. Jam formigis rudimenta strukturo kun grandaj urboj kiel centro, mezgrandaj kiel spino kaj malgrandaj kiel ligilo.

En la nuna reformo la ŝtato difinis tri kategoriojn de urboj: Al la unua kategorio apartenas 14 unuopaj planizaj urboj, kiel Shenyang kaj Xi'an. La ŝtato donis al ili provinc-nivelan rajton en ekonomia administrado, por ke tiuj centraj urboj elmontru sian iniciativon kaj aktivecon en la ekonomia konstruado. Al la dua apartenas 72 urboj provantaj sintezan reformadon de la ekonomia sistemo, kiel Shashi kaj Changzhou. Kaj al la tria apartenas la ĉemaraj malfermitaj urboj, kiel Dalian kaj Ŝanhajo. La ŝtato donis iom post iom pli multajn rajtojn de memdecido al ili kaj favorajn kondiĉojn al alilandaj investantoj, por ke tiuj urboj povu rapidigi la teknikan reformadon de siaj malnovaj entreprenoj kaj la disvolvon de sia eksporta ekonomio. La praktikado de tiuj rimedoj ebligis al la ĉinaj urboj bone ludi rolon de komplekso.

MIRINDA KAVERNO-KINEJO

Oni malofte vidas naturan kavernon, kiu servas kiel kinejo. Tamen en Zhengdong-subdistrikto de Xuyong-gubernio, Sichuan-provinco, sudokcidenta Ĉinio, ja ekzistas tia kaverno.

Jam en 1984 junaj kamparanoj fondis tie la naturan kavernon-kinejon. En la pasintaj ses jaroj ili projekciis 1 500 filmojn por 150 000 rigardantoj. La kavernon-kinejo altiras ĉinajn kaj alilandajn turistojn per sia originaleco.

La granda kavernon aspektas kiel halo kaj havas 500-600 sidlokojn. La kavernon kun aero freŝa estas varma en vintro kaj malvarmeta en somero. Pro la malgrandeco de la aperturo la kavernon estas senluma kaj oni tute ne bezonas kurtenon por ŝirmi ĝin kontraŭ lumo. Ĝi estas ideala por filmprojekciado. Vere estas granda ĝuo rigardi filmon en tiu kavernon.

Wuqiao — la tria akrobata konkursejo de la mondo

Teksto de CHEN SI

Fotoj de XUE CHAO

MIRAKLA estas la akrobata mondo, kie oni povas laŭplaĉe krei ion el nenio, malaperigi ion en palpebrumo sen ajna spuro, fari transkapiĝon kaj iri sur streĉita ŝnuro same kiel sur tero kaj fari nekredablajn movojn per paro da piedoj pli lerte ol per la manoj. En la pli ol 2 000-jara historio de sia disvolviĝo, tiu antikva arto trovis ŝaton de homoj de la tuta mondo per siaj novaj, miraklaj kaj belaj prezentadoj.

Eble neniu scias, kiom da akrobataj ensembloj troviĝas en la mondo. Sed monde famaj konkursejoj de akrobataĵoj estas nur du: unu estas la Pariza Internacia Akrobata Festivalo “Morgaŭ kaj Estonteco” de Francio, la alia estas Montekarla Internacia Akrobata Festivalo de Monako. En tiuj du akrobataj festivaloj eminentaj akrobatoj el la Oriento kaj la Okcidento prezentis siajn majstraĵojn, kaj ĉinaj akrobatoj multfoje akiris la unuajn premiojn per novaj, miraklaj kaj belaj prezentadoj kun orientaj karakterizaĵoj kaj estis titolitaj kiel “gemo de la orienta arto”. Bedaŭrinde, tiu antikva arto, kiu originis en Ĉinio kaj poste disvastiĝis tra la mondo, ne havis internacian konkursejon en sia lando ĝis antaŭ 5 jaroj, kaj ĉinaj akrobatoj povis akcepti prijuĝon nur en alilandaj konkursejoj. Establi internacian akroban konkursejon en Ĉinio restis revo de ĉinaj akrobatoj de pluraj generacioj. Kaj tiu revo realiĝis en 1987, kiam en Shijiazhuang, ĉefurbo de la provinco Hebei, okazis la Unua Ĉina Wuqiao-a Internacia Akrobata Festivalo.

Wuqiao estas urbeto nemalproksima al Shijiazhuang. La festivalo portas la nomon Wuqiao pro tio, ke ĝi havas profundan historian rilaton al akrobataĵoj. En la pasinteco cirkulis en Ĉinio la diro: “Sen wuqiao-anoj ne eblas starigi akroban trupon.” Dum la pli ol 40 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la urbeto kulturis 1 600 akrobatojn por diverslokaj profesiaj akrobataj ensembloj de la tuta lando. Krome, en ĉiuj akrobataj ensembloj fonditaj de ĉinoj ekster Ĉinio estas wuqiao-anoj. S-ro Dominique Mauclair de Francio, famulo en la internacia akrobata rondo, diris: “Wuqiao estas ne nur hejmloko de la ĉina akrobatarto, sed ankaŭ lulilo de la monda akrobatarto. Indas titoli Ĉinan Internacian Akroban Festivalon per la nomo Wuqiao.”

De 1987 ĝis 1991, la Ĉina Wuqiao-a Internacia Akrobata Festivalo okazis jam tri-foje. Pli kaj pli multiĝis partoprenantaj landoj kaj pli kaj pli altiĝis la

nivelo de prezentitaj akrobataĵoj. En la unua festivalo partoprenis akrobatoj el Francio, Aŭstralio, Sovetunio kaj aliaj sume 8 landoj kaj regionoj, kaj en la tria el 11 landoj kaj regionoj. En ĉiu el la tri festivaloj prezentis mondnivelaj majstroj de akrobatarto, ekzemple, franca “reĝo de turniĝaj magiaĵoj” kaj du mongolaj akrobatoj, kiuj gajnis grandan premion de la Pariza Internacia Akrobata Festivalo per duopaj molakrobataĵoj, partoprenis en la festivalo por konkursi kun diverslandaj elstaraj akrobatoj.

Por havi firman pozicion en la mondo, akrobata konkursejo devas havi ne nur altnivelajn akrobataĵojn, sed ankaŭ sian originalecon. La Pariza Internacia Akrobata Festivalo de Francio portas la nomon “Morgaŭ kaj Estonteco”, ĉar ĝiaj konkursantoj ĉefe estas junuloj kaj geknaboj. Laŭ ĝia fondinto s-ro Mauclair, por disvolvi la akroban aferon, oni nepre devas doni grandan atenton al la estonteco, kaj sen junuloj ne estas la estonteco. Tial la Pariza Festivalo celas havigi al la estontaj akrobataj steloj lokon por montri sian talenton kaj interŝanĝi sperton.

Kiajn distingiĝajn karakterizaĵojn havas la Ĉina Wuqiao-a Internacia Akrobata Festivalo, kiu fakte funkcias kiel la tria granda akrobata konkursejo de la mondo? Unue la ĉinaj akrobatoj montris malfacile atingeblan superan lertecon. En diversaj akrobataj konkursejoj de la mondo, ĉinaj akrobatoj foje refoje ravis la juĝantojn kaj spektantojn per siaj lertaj novaj, miraklaj kaj belaj akrobataĵoj neimageblaj por okcidentanoj. De 1982 Ĉinio 9-foje gajnis la “Prezi-


Inaŭguro de la Tria Wuqiao-a Internacia Akrobata Festivalo






Ĉina akrobataĵo "Trairo de turniĝantaj ringegoj" gajninta la premion "Ora leono"

Mongola akrobataĵo



"Akrobataĵo sur piedoj" prezentata de Wuqiao-anoj





Franca akrobataĵo

Kuba akrobataĵo



dentan Premion de la Franca Respubliko”, la plej altan premion de la Pariza Internacia Akrobata Festivalo “Morgaŭ kaj Estonteco”. Sekve, akcenti lertecon de la akrobatarto estas la plej ĉefa trajto de la Wuqiao-a Internacia Akrobata Festivalo. Unu el la ekzemploj estas la ĉina akrobataĵo “salto tra turniĝantaj ringegoj”, kiu gajnis la “Premion de Ora Leono”, la plej altan premion de la Tria Wuqiao-a Internacia Akrobata Festivalo. Ĝenerale dirite, ne facilas salti tra ringo kun diametro de 70 centimetroj. Sed en la nomita akrobataĵo, tri akrobatoj devas samtempe salti de malsamaj direktoj tra horizontale turniĝantaj ringegoj, kiuj staras unu sur alia. Tia alta lerteco admirigis la alilandajn juĝantojn.

La nacia stilo kaj loka gusto estas alia celo strebata de la Wuqiao-a Akrobata Festivalo. Ekzemple, la prezentaĵo “Leona danco”, kiu gajnis la “Premion de Ora Leono” en la Unua Wuqiao-a Internacia Festivalo, prenis la ĉinan tradicion leondancon kiel bazon kaj ensorbis altan kaj malfacilan akrobatan lertecon. Ĝi aperis kun frapa freŝeco antaŭ ĉinaj spektantoj kaj gajnis unuvoĉan laŭdon de ĉinaj kaj alilandaj juĝantoj. En la Tria Wuqiao-a Internacia Akrobata Festivalo varman bonvenon trovis ankaŭ la programero “Libera bicikla akrobataĵo” prezentita de usona cirka trupo kun gaja diskomuzika akompano, kiu spegulis la modernan ĉarmon de Usono. Laŭdire, iuj ĉinaj junuloj eĉ petis de la trupo la kasedon de la akompana muziko por lerni tian biciklan akrobataĵon.

Post 5 jaroj da klopodado, la Ĉina Wuqiao-a Internacia Akrobata Festivalo faris ĝojigan paŝon sur la vojo al la tria granda konkursejo de la mondo. Ĝi fondis memstaran organizaĵon kaj decidis okazigi la festivalon en ĉiu dua jaro. Nun la festivalo havas jam vastan influon en la monda akrobata rondo, kaj multaj eksterlandaj akrobatoj fieras pri la premioj gajnitaj en la festivalo.

Fakte, la Wuqiao-a Internacia Akrobata Festivalo ne estas la unua mondskala akrobata festivalo organizita de Ĉinio. Laŭ historia kroniko, tiel frue kiel antaŭ 2 000 jaroj Ĉinio jam okazigis internacian akrobatan festivalon. La tiama Imperiestro Wudi (140-87 a.K. sur la trono) invitis ne nur akrobatojn el Japanio, Koreio, Persio kaj aliaj aziaj landoj, sed ankaŭ magiistojn el Romo kaj aliaj lokoj de Eŭropo. Prezentiĝis pli ol cent akrobataĵoj. Tio ne nur akcelis akrobatan interŝanĝon inter diversaj landoj, sed ankaŭ impulsis la ĉinan akrobatarton en oran tempon, en kiu aperis granda nombro da repertuaraj prezentaĵoj kaj metis bonan bazon por disvolvi la ĉinan akrobatarton.

En la pli ol du mil jaroj, la antikva akrobatarto radikigiĝis kaj disvolviĝis en la Okcidento, kaj la okcidenta akrobatarto en iuj flankoj jam superis la ĉinan. Hodiaŭ, la ĉinaj akrobatoj, heredante la tradicion, senĉese kreas novajn programerojn, kiuj trovas bonvenon ĉe ĉiam pli multaj spektantoj ĉinaj kaj eksterlandaj. La Wuqiao-a Internacia Akrobata Festivalo plivigliĝis la interŝanĝon inter la ĉina akrobatarto kaj la monda akrobatarto. Oni atendas, ke akrobatarto radios pli brile en la Oriento. ■

Sportaj Steloj kaj Iliaj Gepatroj

ANTAŭ nelonge Ĉinio faris elektadon de sportaj steloj kaj iliaj gepatroj. Estis premiita aro da gepatroj, kiuj sukcesigis siajn gefilojn en la sportista kariero. Iliaj faroj diris al ni, kian rolon ludas la familio kaj gepatroj de elstara sportisto en lia kreskado. Ĉi sube mi prezentos al vi 2 ekzemplojn.

ELSTARA GIMNASTO KAJ LIA PATRINO

“Por mi, miaj gepatroj estas la plej estimataj homoj en la mondo,” diris s-ro Li Jing, ĉina gimnasto, kiu gajnis la ĉampionecon de paralelado en la 26-a Monda Gimnastika Ĉampionea Konkurso, 1991.

Li Jing dankas siajn gepatrojn pro tio, ke tiuj lasis lin lerni gimnastikon de la knabeco, kaj tiukampe li fariĝis elstara gimnasto. Lia patro dum longaj jaroj studas pri teo kaj lia patrino estas kuracistino. Ili ambaŭ ŝatas sporton kaj esperis, ke iliaj filoj estos kapablaj en sportoj. Tiel ili sendis siajn unuajn du filojn lerni uŝu-on ekde la infanaĝo.

Fakte ilia plej juna filo, Li Jing, eklernis gimnastikon en hazardo. En 1975, lia patrino konatiĝis kun s-ro Zhou Xin, gimnastika trejnistoj kaj petis lin lernigi al Li Jing gimnastikon. Kaj trejnistoj Zhou ekŝatis lin je la unua rigardo. Tiam Li Jing aĝis nur 6 jarojn.

De kiam Li Jing eniris en amatoran sportlernejon, lia patrino donis grandan atenton al lia trejnado. La trejnado de la lernejo estas regula kaj peniga. Ĉiutage lia patrino ellitigis lin frumatene kaj akompanis lin al la lernejo malgraŭ vento kaj pluvo. En sia infaneco, Li Jing estis febla. Por la regula trejnado oni devas preni manĝaĵojn nutroriĉajn, sed lia

familio estis neriĉa. Tial liaj gepatroj speciale bredis du kokinojn por ke li povu manĝi ovojn ĉiutage.

Lia trejnado iris ne glate. En trejnado Li Jing ofte vundiĝis aŭ je brakoj aŭ je piedoj. Lia patrino bedaŭris, ke li suferas multe en la juna aĝo. Iam venis al ŝi la ideo, ke ŝi ne plu lasos sian trian filon Li Jing al la sportlernejo, sed en la sekvanta mateno ŝi vekis lin kiel antaŭe. Dank’ al la subteno de siaj gepatroj, Li Jing trejnis sin en amatora sportlernejo 4 jarojn.

En 1979 la Hunan-a Gimnastika Teamo kaj la kantona kaj pekina sportaj institutoj samtempe decidis akcepti lin, tio tamen embarasis liajn gepatrojn: ili sentos grandan maltrankvilon, se ili lasos la malpli-ol-10-jaran knabon lerni en la malproksima Pekino; sed la kondiĉoj por lernado en Changsha, ĉefurbo de Hunan, kaj Kantono, kiuj troviĝas pli proksime de la hejmo, ne estas tiel bonaj kiel tiuj de Pekino. Por la kariero de sia filo, la gepatroj fine decidis sendi Li Jing al Pekino por studado.

Li Jing kaj liaj gepatroj



Li Jing lernis 7 jarojn en la Pekina Sporta Instituto. Tiutempe lia patrino veturis en Pekinon por lin viziti ĉiujare. Ĉiufoje ŝi alportis al li manĝaĵojn ŝatatajn de li. Ŝi ja estis klara, ke en la sporta trejnado oni ne povas eviti kontuzon, kaj ke la instituto havas medikamentojn, sed ŝi ankoraŭ alportis al li iom da kuraciloj, alie ŝi ne povis esti trankvila. Meĥanika ludilo estas alia objekto, kiun ŝi ĉiufoje alportis al li, kiam ŝi veturis al Pekino. Ĉiufoje informiĝinte, ke ŝia filo maldikiĝis aŭ vundiĝis, ŝi fariĝis ege maltrankvila, forte dezirante tuj flugi al li. Sed kiam Li Jing ripozis kelkajn tagojn hejme post konkurso, ŝi urĝis lin reiri al la instituto por ke tiu ne malfruigu al la trejnado. La patrino amo al la filo kaj espero por lia estonteco ĉiam kunekzistas en ŝia koro.

MONDĈAMPIONINO KAJ ŜIA PATRINO

Zhou Lingmei, kiu rompis la mondan rekordon de virina unu-kilometra biciklado, diris: "Mi ŝuldas mian ĉampionecon al mia kara patrino."

La 57-jara Wang Guoying, patrino de Zhou Lingmei, estas ordinara kamparanino, kiu neniam vizitis lernejon. Antaŭ pli ol 20 jaroj ŝia edzo forpasis pro nekuracebla malsano kaj lasis al ŝi tri malgrandajn infanojn. Ne timante malfacilojn, Wang Guoying prenis sur sin la pezan ŝarĝon flegi kaj eduki la gefilojn.

Ŝi permesis al Zhou Lingmei viziti lernejon, kiam tiu atingis la lernoagon. Pro simpatio al ŝi, iuj admonis ŝin: "Vi ja havas multajn malfacilojn por sole vivteni la 3 infanojn. Ne lasu la knabinon viziti lernejon." Sed Wang Guoying respondis: "Ne! La infanoj devas lerni! Ŝi nepre estos klerigita malgraŭ miaj malfaciloj." Ŝi ripetfoje admonis al sia filino diligente lerni. Inluate de sia patrino, Zhou Lingmei fariĝis laborema, diligenta en la studo kaj kapabla por elporti suferojn jam de sia infaneco.

Post kiam Zhou Lingmei eniris en geknaban sportlernejon de Jiangsu-provinco en 1982, Wang Guoying ofte biciklis kelkajn kilometrojn al la lernejo por alporti vestojn kaj nutraĵojn al sia filino. Ŝi diris al sia filino: "Mia infano, vi jam partoprenis en la trejnado, do vi devas venki ĉiajn malfacilojn kaj sukcesi en via kariero." Ŝi ŝpare vivis por ke la filino pli bone manĝu. Kiam Zhou Lingmei lernis en porknaba sportlernejo, Wang Guoying biciklis entute milojn da kilometroj por viziti sian filinon en la lernejo.


Zhou Lingmei ne vanigis la esperon de sia patrino. Ŝi ĉiam energie trejnis sin dum lernado en la sportlernejo. Foje, ŝi tordis al si la piedon en ekzercado de longosalto kaj ne povis iri plu per sia ŝveliginta piedo. La trejnisto ripozigis ŝin. Sed ŝi, kŝante sur la lito, ekzercis siajn suprajn membrojn. Dank' al la diligenta ekzercado, ŝi fariĝis pli forta

kaj multe altigis sian sportan nivelon.

Post kiam Zhou Lingmei eniris en la provincan biciklan teamon, ŝia patrino ne povis plu bicikle viziti ŝin, ĉar la vojo estis tro longa. Sed Wang Guoying ne forlasis la patrinan respondecon. Ŝi, analfabetino, ofte petis aliajn skribi al Zhou Lingmei, admonante: "Ne estu kontenta je viaj atingoj, plue strebu." La patrino koro kuraĝigis Zhou Lingmei en la obstina ekzercado. Iufoje, kiam ŝi biciklis sur ŝoseo, ŝi kaj ŝia biciklo koliziis kontraŭ cementa fosto, irante sur deklivo. Ŝia biciklo estis grave difektita kaj ŝi ricevis sur sia femuro tranĉvundon je 7 cm longan. Post la suturado, ŝi devas ripozati almenaŭ 10 tagojn, sed ŝi, kunpreminte la dentojn, denove venis en la trejnejon, memorante la admonon de sia patrino.


1990 estis feliĉa jaro por Zhou Lingmei. En la 11-a Azia Sportkunveno ŝi, filino de ordinara kamparano, rompis la mondan rekordon de virina unu-kilometra biciklado, kreitan de sovetia sportistino antaŭ 6 jaroj, kaj fariĝis unu el la 10 ĉinaj elstaraj sportist(in)oj en 1990.

Oni gloras Zhou Lingmei kaj dankas al Wang Guoying, kiu elkulturis bonan filinon por la lando. Kiam oni donis premion al Wang Guoying, tiu diris: "Tio ja estas la pasintaĵo. Mi esperas, ke ŝi gajnos oran medalon ankaŭ en olimpikoj." ■



mirinda KOLOMBIO

de KOLOMBIAJ ESPERANTO-ELDONAĴOJ



*Diversaj aspektoj
de la belega lando, "Porto de Sudameriko," en luksa 18 poŝtkarta
ujo, kun tekstoj en la E-lingvo.*

Prezo: 15 usonaj dolaroj (kun sendo-kosto)

Mendoj ĉe:

LUIS FELIPE SALDARRIAGA
POŝTKESTO 5587
MEDELLIN, KOLOMBIO



Novaj loĝdomoj

ZHANG QINGZHEN:

Ĝenerale pri la nuna vivo de ĉinoj

NIA leganto demandis, kiujn ŝanĝojn ekhavis ĉinoj en sia ĉiutaga vivo en la 10 jaroj de post ekpraktiko de reformado kaj pordomalfermo en Ĉinio. Estas malfacile por mi detale respondi tion en unu mallonga artikolo. Sube mi prezentos al niaj legantoj iujn rimarkindajn ŝanĝojn.

INKLINO AL LAŬMODAJ FASONOJ

En Ĉinio iuj maloftaj fenomenoj antaŭ 10 jaroj fariĝis hodiaŭ ofte vidataj: Ĉinoj sin vestas per diverskoloraj kaj diversfasonaj eŭropaj vestoj, roboj, T-formaj ĉemizoj kaj aliaj laŭmodaj vestoj; oni telesendis en televida programo prezentadon de manekenoj; ministerio de tekstila industrio okazigas ĉiujare kunvenon por informi pri la tendenco de laŭmodaj fasonoj; la antaŭaj dikaj, pezaj kaj malmolaj vestoj estas iom post iom anstataŭitaj de la maldikaj, malpezaj kaj molaj; antaŭe ĉinoj ŝatis veston por pluraj sezonoj, sed nun ili ha-

vas plurajn vestojn taŭgajn por unu sezono; multekostaj vestoj kun famaj markoj de Ŝanhajo, Pekino kaj Tianjin nun vidiĝas ankaŭ en malgrandaj urboj kaj vilaĝoj; tie la gejunuloj portas belajn laŭmodajn vestojn post laborhoroj; ŝajnas, ke ili volas konkursi ĉiflanke kun urbanoj.

Antaŭ 10 jaroj, alilandaj ĵurnalistoj diris, ke Ĉinio estas "dezerto de laŭmodaj vestoj". Sed 5 jarojn poste, kiam ĉina modelin-grupo aperis sur la germana scenejo por prezenti "Nova Silka Vojo", la loka ĵurnalo tion raportis en la artikolo "Filinoj de Mao Zedong Sin Vestis per Laŭmodaj Vestoj". Aŭtune de 1990, kiam fama franca fasonisto Pierre Cardin vendis siajn vestojn kun marko de Cardin en iu vestovendejo de Pekino, li diris: "Pekinanoj estas tiel ĝojaj kaj belaj, ke mi preskaŭ ne kredas." Li kaj liaj kolegoj decidis funkciigi en Ĉinio dekkelkajn magazenojn de virinaj laŭmodaj vestoj en la venontaj 5 jaroj.

Vere, eĉ ĉinoj mem miris, ke

tiuj, kiuj antaŭe kaŝe kudris novajn vestojn, timante alies kritikon, hodiaŭ senĝene sin vestas per novaj vestoj kun originalaj fasonoj; tiuj, kiuj antaŭe preferis vestojn malfacile difekteblajn kaj popularajn, ĝojoplene sin beligas per laŭmodaj vestoj; modelin-grupoj el maljunaj kaj mezaĝaj intelektulinaj aperis sur scenejoj unu post alia; estis tre malfacile varbi modelinojn en la 80-aj jaroj, sed nun estas miloj da kandidatoj.

Vestoj estas spegulo de la historio. En la socio, en kiu la materia vivo estas malriĉa, oni vivis malriĉe, sed dank' al pliboniĝo de la vivo, miloj kaj miloj da konsumantoj antaŭ la vestaj vendotabloj akcelis, per sia granda entuziasmo, la disvolviĝon de tekstila kaj konfekcia industrioj. Oni povas diri, ke neniuj ŝanĝoj estas pli granda ol tiu de la vestoj, kiu bone montras la ŝanĝon de ĉinoj en la lastaj 10 jaroj.

**PROSPERA BAZARO —
ABUNDA MANĜTABLO**

Ĉinoj diras, ke plej grava estas manĝaĵo por popolo. De tio oni scias, ke ĉinoj donas grandan atenton al manĝaĵoj. La ĉina kulinara arto estas ĉiam admirata tra la tuta mondo. Sed antaŭe dum longa tempo ĉinoj plejparte vivis malfacilan vivon. Oni estis kontentaj, kiam ili sate manĝis.

Kaj nun? Mi prenu matenmanĝon kiel ekzemplon. Antaŭ dekkelkaj jaroj, matene oni plejparte manĝis kaĉon, mantoon kaj peklaĵon. Tiuj, kiuj havas pli bonan vivkondiĉon, prenis nur sojfaban lakton kaj frititan platpaston. En la lastaj jaroj, en ekonomie prosperaj regionoj reaperis multaspecaj tradiciaj manĝetoj en la merkatoj, ili vidiĝas ankaŭ en ordinaraĵoj familioj. Iuj matene prenis kukojn kaj teon en restoracio. Kaj aliaj jam alkitimiĝis al eŭropaj manĝaĵoj — lakto, ovo kaj pano.

En magazenoj de manĝaĵoj vendiĝas diversspecaj legomoj kaj viandoj, kiaj kokoj, anasoj, fiŝoj, porkaĵo kaj bovaĵo.

Antaŭe ordinaraĵoj popolanoj kontentiĝis pri bovlo da grasa porkaĵo sur la tablo. Sed hodiaŭ ili postulas manĝaĵojn pli kaj pli fajnajn. Fileo, kolbaso, ŝinko, blanka orelfungo kaj giromitro jam fariĝis popularaj manĝaĵoj de ordinaraĵoj ĉinoj.

Dank' al la disvolviĝo de produktado, ĉinoj havas abundajn manĝaĵojn. En 1987, la Agrikultura Ministerio postulis, ke la kamparanoj bone zorgu pri legomĝardenoj kaj vendistoj plenigu siajn legombudojn por ke la loĝantoj havu plenan legomkorbon. Ŝanhajo havas 2 milionojn da familioj

el 7 milionoj da loĝantoj. Pro tro da loĝantoj, la provizado de manĝaĵoj ĉiam ĝenis la urbon. Dank' al la penado en la lastaj du jaroj, tie sinsekve fondiĝis grandaj legomĝardenoj, bredejoj kaj nun multe pliboniĝis la tiea provizado. Antaŭe pro manko de manĝaĵoj en Harbin la urbanoj iris aliloken por aĉeti nutraĵojn. Nuntempe en antaŭurboj de Harbin bone funkcias bazoj de legomoj, kortobirdoj, ovo kaj lakto, pro tio realiĝis memprovizado aŭ fundamenta memprovizado de manĝaĵoj en Harbin. Antaŭe fiŝoj estis raraj por la loĝantoj norde de la Granda Muro, sed nun diversspecaj fiŝoj jam aperis sur tablo de la tieaj loĝantoj.

DE DOMETOJ AL ETAĜDOMOJ

Preskaŭ ĉiuj alilandaj turistoj, kiuj vizitis Ĉinion, havis jenan impreson: ĉie vidiĝas etaĝdomoj; diversspecaj loĝkvartaloj distingiĝis per siaj propraj trajtoj; sennombraj novtipaj domoj kaj brikdomoj dislokiĝis sur verdaj kampoj kaj Leŭsa Altebenajo.

En la 60-aj jaroj, la pekinanoj estis fieraj pri la Popola Halo, la Ĉina Agrikultura Ekspoziciejo kaj aliaj 8 grandaj konstruaĵoj. En la 80-aj jaroj, sennombraj etaĝdomoj leviĝis tie kaj ilia plejparto estas loĝdomoj. En la ĉinaj urboj kaj urbetoj, la pokapa loĝareo estis 3.6 kvadrataj metroj en 1978 kaj ĝi superis 7.1 en 1990. Tio ne estas facile plenumbla afero por la lando kun 1.1 miliardoj da loĝantoj.

En Pekino, Tianjin kaj aliaj grandaj urboj, la loĝareo de la popolo preskaŭ duobliĝis en la lastaj 10 jaroj. En la antaŭe dezertaj an-

taŭrboj nun arbore staras etaĝdomoj kaj la kvartaloj kun domaĉoj kaj mallarĝaj stratetoj antaŭe estis anstataŭitaj de larĝaj stratoj kaj etaĝdomoj. Ĉie vidiĝas plansetlejoj konsistantaj el altaj etaĝdomoj, skvaroj kaj vendejoj. Adiaŭinte siajn kadukajn dome-tojn postlasitajn de la historio, milionoj da loĝantoj enloĝiĝis en novaj domoj.

La kamparo ŝanĝiĝis pli multe. De 1979 ĝis 1990 en la ĉina kamparo konstruiĝis novaj domoj kun areo de 6.8 miliardoj da kvadrataj metroj, t.e. triobla kiom la totala konstru-areo en la antaŭaj 30 jaroj.

Kaj krome, la domoj estas multe pli bonaj ol la antaŭaj. La nove konstruitaj loĝdomoj estas bone instalitaj: en la kuirejo troviĝas servica ŝranko kaj vazo por lavi legomojn; en tualetejo — bankuvo kaj duŝilo. Nun en Pekino furoras loĝeja dekoracio. Akirinte novan loĝejon, antaŭ ĉio oni cerbumas pri dekoracio de plafono, planko, muroj kaj instalado de novtipaj lampoj. Tiele en Pekino aperis multaj butikoj de loĝeja dekoraciado.

Kompreneble, tio ne signifas, ke la problemoj de loĝdomoj en Ĉinio estis jam solvita. Manko de loĝejoj restis urĝe solvenda problemoj por multaj urboj en Ĉinio: Iuj loĝas kompakte, aliaj loĝas en domo kaduka kaj lika, kaj ekzistas ankaŭ tia fenomeno, ke pluraj familioj uzas komunan kranon kaj komunan necesejon.

FLUOJ HOMA KAJ VETURILA

Koncerne la urban trafikon en Ĉinio, antaŭ ĉio oni parolas pri la

En butiko de manĝaĵoj



En vestobutiko



torentaj biciklofluoĵoj. En la pinthoroj sur ĉiuj stratoj vidiĝas seninterrompaj torentoj de bicikloj. Sub la situacio, ke la trafiko de Ĉinio estas ne tiel progresita kiel tiu de la evoluantaj landoj, multaj ĉinoj prenas kiel trafikilon malkaran biciklon, sed praktikan kaj oportunan. En la nuna Ĉinio la nombro de bicikloj jam superis 200 milionojn.

En la ĉinaj urboj, tiuj, kiuj ne biciklas, veturas ĝenerale per aŭtobuso, kaj nuntempe pli kaj pli multaj homoj prenas taksion. Kvankam estas pli ol 700 mil privataj aŭtoj, sed tiu nombro estas preskaŭ ne menciinda kompare kun la nombro de la loĝantoj. La ĉina registaro donas grandan atenton ankaŭ al la konstruo de ŝoseoj. Ĝis la fino de 1990, oni konstruis sole en antaŭurboj de Pekino ŝoseojn longajn 9 000 km, kiuj etendiĝas tra ĉiuj vilaĝoj. Sur la 1-a, 2-a kaj 3-a ĉirkaŭurbaj ŝoseoj kaj la norda 4-a ĉirkaŭurba ŝoseo kuras la plej grandnombraj veturiloj en Pekino. En la lastaj jaroj ekfunkciis en la antaŭurboj de Pekino unuaklasaj, superklasaj kaj fermitaj aŭtovojoj. En Pekino aperis multaj aŭtovojoj trefkruciĝoj. Sole sur la 2-a ĉirkaŭurba ŝoseo nun majestas 11 aŭtovojoj trefkruciĝoj. Malgraŭ tio, la aŭtovojoj estas ankoraŭ movoplenaj kaj la arterioj ofte ŝtopitaj.

En Ĉinio, oni vojaĝas ĉefe per trajno, ankaŭ en kiu oni devas interpuŝiĝi. Antaŭe vojaĝi per aviadilo estis konsiderata kiel lukso. Kvankam nuntempe pli kaj pli multaj vojaĝis per aviadilo, tamen la nombro de la aviadilaj pasaĝeroj estas malgranda proporcie en Ĉinio. Por plibonigi la trafikan stacion, oni plilongigis trajnon de 12 vagonoj al 17 kaj pliiĝis pasaĝerajn aviadilojn inter la ĉinaj urboj.

Ĉinio estas lando vasta teritorie, tamen la trafikiloj estas malmultaj, tial ĉinoj ĉiam havas malfacilojn en la trafiko. Kvankam la trafika stato multe pliboniĝis, sed oni devas fari multe da penado por realigo de la kvar modernigoj de la lando. ■

ZHONG WEI:

Kupra minejo antaŭ 2 000 jaroj

TIO estas muzeo konstruita sur ruino de kupra minejo antaŭ pli ol 2 000 jaroj. Tie la bone konservitaj antikvaj ŝaktoj kaj aliaj restaĵoj montris al ni, kiel antikvaj ĉinoj ekspluatit minejon.

Jen la Muzeo de la Ruino de Antikva Kupra Minejo en Tonglŭ-monto, kiu situas en Daye-gubernio, Hubei-provinco, sude de la meza baseno de Yangzrivero. Enirinte en la protektejon de la ruino, mi vidis brilajn kuprajn florojn ĉie sur la monto. Laŭdire, tiuj dentobrosaj floroj kreskas sur la tero entenanta kupran elementon ekskluzive kaj ĝuste ili montris al la antikvaj ministoj la mineralajn riĉfontojn.


Post pli-ol-10-jara prifosado, oni sinsekve trovis el la mineja ruino en Tonglŭ-monto 7 minekspluatitajn restaĵojn kaj 3 ruinojn de fandejoj. En la ekspozicio de la ruino, mi vidis minekspluatejon en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.): sur la tereno de ĉ. 400 kvadrataj metroj interkruciĝis pli ol 100 ŝaktoj, klinaj putoj, galerioj kaj tuneloj firme subtenataj per palisoj. El iliaj profiloj la grandaj estas ĉ. 1 m² kaj malgrandaj — ĉ. 0.36 m². En iuj galerioj troviĝas ankaŭ defluiloj. Ĝenerale la ŝaktoj estas 30-40 m. profundaj kaj iuj pli ol 60 m., malpli altaj ol la tiea subterakva nivelo. Estas admirinde, ke oni povis konstrui tiel grandskalajn subterajn galeriojn, kiuj

povis garantii la produktadon en sekureco, en la tempo, kiam la laboriloj estis tre simplaj.

En la orienta parto de la ekspozicio vidiĝas imitaĵo de antikvaj ŝaktoj kaj galerio, kien la vizitantoj povas eniri kaj detale rigardi. Interne de la halo sur la murborderoj altaj je 3 m vidiĝas reproduktaĵoj el lokaj erco kaj rokpolvo, kiuj montras la geologian sekcon de la subtera minejo antaŭ pli ol 2 000 jaroj.

En la suda parto de la ekspozicio vidiĝas ekspluatiloj de malsamaj historiaj periodoj elfositaj el la ruino: lignaj subteniloj; prospektorilo por gvidi la enfosadon en galerioj; diversaj elfosiloj kiaj kupraj hakiloj, adzoj kaj ĉiziloj, feraj marteloj, ŝpatoj kaj sarkiloj, lignaj ŝoveliloj kaj ŝpatoj; akvokondukiloj kiaj lignaj kanaletoj, kuvoj kaj ĉerpiloj; korboj bam-

Antikvaj instrumentoj por minekspluatado





La Muzeo de Antikva Kuprominejo

Ŝakto antaŭ
2 000 jaroj

buaj kaj lianaj. El ili la plej interesa estas la supre menciita prospektorilo, t.e. lignogravurita boatforma ujo. Siatempe oni uzis ĝin laŭ jena maniero: Oni prenis iom da rokpolvo elfosita el ŝakto, metis la rokpolvon en la ujon kaj lavis ĝin per akvo por ke la tero kaj erco disiĝu. Laŭ la analizo de fakuloj, la antikvuloj eble determinis minan proporcion entenatan de la ercoj kaj gvidis la fosadon de la galerio pere de gravita analizo.

Dank' al progreso de la laboriloj la minekspluata metodo progresis senĉese. Antaŭ la Periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.-K.) oni uzis kuprajn ilojn unue por fosi ŝakton kaj poste galerion. Oni ekspluatis de supre malsupren laŭ la minaj vejnoj. En la Periodo de Militantaj Regnoj, feraj laboriloj akcelis la fosadon. Dank' al tio, oni kreis novan ekspluatmetodon, t.e. unue oni fosis ŝakton horizontalan aŭ klinan ĝis la mineja fundo, poste ili daŭrigis la fosadon ĝis la mineralo, de kie ili ekspluatis en la horizontala direkto. Unue ili fosis la malsupran tavolon kaj poste la supran kaj samtempe ŝtopis la malsupran ekspluatitan tavolon per rubo falin-

ta de la supra tavolo. Tiel oni plenigis la malsupran tavolon kaj reduktis la transportadon de rubo. La metodo estis vere admirinda! Eĉ hodiaŭ tiu metodo estas vaste aplikata en multaj landoj.

Antikvaj ministoj efike solvis ne nur la problemojn pri elfosado kaj subtenado en profunda ŝakto, sed ankaŭ serion da teknikaj problemoj inkl. de levado, akvoforkondukado, ventolado, lumigado k.a. Ligna vinĉo jam aperis en la Periodo de Militantaj Regnoj. Dank' al apero de vinĉo, vindaso kaj aliaj leviloj ministoj povis transporti bambuajn korbojn plenigitajn per minaĵoj de la ŝaktofundo al la tersurfaco.

Subtera akvo multe minacis ekspluatadon en profunda ŝakto. Tial oni fosis galerion, ŝakton kaj kanaleton destinitajn por forkonduki subteran akvon. Profitante de la aerprema diferenco kaŭzita de malsama alteco de ŝaktoĉambroj, oni ventolis per natura aerfluo kaj ŝanĝis la aerfluan direkton, ferminte iujn eluzitajn galeriojn, por ke la aerfluo atingu la plej profundan laborlokon. En ŝaktofundo oni bruligis bambuajn stangojn kaj pinajn branĉojn por

lumigado. Ĉio tio formis serion de antikva tekniko por mineja ekspluatado en profunda ŝakto.

El la fandega ruino ĉe antikvaj ŝaktoj oni trovis pli ol 10 kuprofandajn fornojn de frua Periodo de Printempo kaj Aŭtuno. Post longa tempo ili plejparte disfalis kaj restis nur 3 el ili kompare bone konservitaj. La fornoj estis konstruitaj el ruĝa argilo, kaolino, silica sablo, ferpulvoro kaj aliaj fajroimunaj materialoj, kaj ĉiu forno konsistas el fornobazo, fajrujo kaj fornokorpo. La reproduktita fornokorpo altas je 1.5 m. La ovala fajrujo havas kapaciton de ĉ. 0.32 m³, ĉe ĉiu ĝia ekstremo troviĝas aeruma truo. Dank' al ili oni garantiis al la fandado egalan venton en fajrujo. Antaŭ la fajrujo estis arkaĵo por defluigi kupran fluidaĵon kaj elfornigi skoriojn. Meze sub la fornofundo estis vaka loko, kiu taŭgis por rezisti kontraŭ humideco kaj teni varmon en la forno. Fakuloj opinias, ke tiu ŝakta forno ja estis rudimento de la moderna ventolizita forno, ĉar oni povas senĉese aldoni al ĝi krudaĵojn, forigi el ĝi skoriojn kaj defluigi kupran fluidaĵon.

Oni unuapaŝe taksis laŭ la ekzistantaj skorioj, ke antikvaj ministoj entute afinaciis ĉ. 80 000-100 000 tunojn da kupro ĉi tie. La kruda kupro siatempe estis transportita, laŭ Yangzi-rivero kaj teraj vojoj, al diversaj lokoj de la lando. Ĝi ludis gravan rolon por disvolvi la brilan bronzan kulturon de Ĉinio. ■

Vojaĝo al antikvaj urbeto kaj vilaĝoj en montregionoj

de WANG XIAOLING

VENINTE en la urbeto Ziyang de Wuyuan-gubernio, mi sentis min kvazaŭ sur duoninsulo. La urbeto, kuŝanta ĉe montpiedo, estas ĉirkaŭita de akvo en tri flankoj. Ekster ĝi estas vasta smeralda teĝardeno sur montoj. En la urbeto ne nur staras altaj domegoj inter ombriĉaj arboj, sed ankaŭ ĉie vidiĝas interkruciĝantaj antikvaj stratetoj. La vojoj pavimitaj per ŝtonaj platoj brilas kiel spegulo, post viŝado de ventoj kaj pluvoj en multaj jaroj.

Oriente, norde kaj okcidente de la urbeto Ziyang estas multaj vidindaj lokoj. Mi decidis viziti malgrandajn montvilaĝojn en la oriento.

Ni veturis per ĵipo sur serpentina montvojo preter ĉarmajn

pejzaĝojn: inter montoj lirlas rojoj, ĉirkaŭ vilaĝoj etendiĝas kampoj. Aparte atentindas, ke ĉiuj vilaĝaj domoj estas konstruitaj el kalkitaj muroj kaj griztegolaj tegmentoj kun suprenlevitaj kornicoj. Kvankam la vilaĝaj domoj viciĝas ne tute orde, tamen harmonie, ĉar ili senescepte sidas dorse al monto kaj vizaĝe al rivero. Sur la alia bordo de la rivero la vilaĝoj ligiĝas kun ŝoseo per elegantaj lignaj pontoj, konsistantaj el dekkelkaj aŭ eĉ dekoj da flosoj interligitaj per liano kaj subtenataj de du dikaj arbotrunkoj ĉe la tuŝpunktoj. Timemuloj hezitas iri antaŭen sur la ponto pro la krakantaj lignaj platoj sub la piedoj. Foje troviĝas ĉe la pontkapo apud vilaĝo ŝtona kolono kun ronda truo, al kiu oni ligis ŝipon. Tie iam estis doko.


Ni preterveturis vilaĝon post vilaĝo sur monta ŝoseo kaj atingis

vilaĝon en valo ombratan de antikvaj arbegoj. Ĉe la vilaĝfino estas dekkelkaj arbegoj kun interkruciĝantaj aŭ pendantaj branĉoj. Unu el ili kurbigas ĝis super la surfaco de la rivero, kvazaŭ ĝi riverencus al la gastoj.

Ni eniris en la vilaĝon tra ŝtonplata ponto. Vilaĝestro konigis al ni, ke la vilaĝo kun pli ol 200 familioj dividiĝas en du partojn distancajn inter si je unu kilometro. Pli multaj domoj en la vilaĝo estis konstruitaj en la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911). Sekvante la vilaĝestron ni iris tra stratetoj pavimitaj per ŝtonoj. La stratetoj zigzagis, kaj irante en ili ni ne povis orientiĝi. Antaŭ kaj post la domoj kreskas legomoj kaj fruktarboj. La medio estas kvieta kaj eleganta.

En la vilaĝo estas bone konservata genta templo. Tia templo vidi-

Miljara ponto



ĝas en multaj montvilaĝoj de la gubernio Wuyuan. Tie la samgentanoj sub la malnova feŭda patriarka klana sistemo kultis la prapatrojn kaj alte prestiĝaj profundajuloj de la vilaĝo kunvokis kunvenon de la vilaĝanoj. La gentaj temploj en la gubernio Wuyuan aspektas aplombe kaj ene estas kortoj, ĝardenoj, 2-3 haloj kaj flankaj ĉambroj dekstraj kaj maldekstraj. En la lignaj partoj de la tegmento estis skulptitaj figuroj de homoj, birdoj kaj bestoj aŭ bildoj pri antikvaj teatraĵoj.

Antaŭ multaj loĝdomoj en Wuyuan staras ekranmuro alta je pli ol du metroj tegmentita per grizaj tegoloj. Ĉe la angulo de la muro pentriĝas floroj kaj birdoj. En ĝia mezo skribiĝas granda ĉina ideogramo Fu, signifanta feliĉon. La montanoj opinias, ke la ekranmuro alportas al la familio favoron, bonaŭguron kaj feliĉon.


Estas alia antikva vilaĝo Likeng, konstruita en la Norda Song-dinastio (960-1127), kun pli ol 100 familioj. Longa roĝo duigis la vilaĝon. La loĝdomoj sur la du bordoj de la roĝo rigardas sin reciproke kaj interligiĝas per lignaj aŭ ŝtonaj pontetoj distancaj inter si po ĉirkaŭ 20 metrojn. Ni venis en iun loĝejon kun skulptita leona kapo sur la tegmento. Inter la antaŭa kaj posta vestiblo troviĝas eleganta korteto, en kies centro estas fiŝbaseno kun areo de 5 kvadrataj metroj. Inter la fiŝbaseno kaj la fronta ĉambro estas fiŝrigardejo, kie la familio distriĝas. En la korteto kreskas tre maljunaj osmanto (*Osmanthus*) kaj krepas mirto. Laŭ la vilaĝa geneologio la krepas mirto aĝas jam pli ol 800 jarojn. La mastro diris al ni, ke la arbo ĉiujare havas junajn branĉojn kun multaj ruĝaj floroj. La vilaĝanoj rigardas la arbon kiel "floran dion" kaj tre ŝatas ĝin.

La vilaĝo Yancun, 20 kilometrojn for de la urbeto Ziyang, estis konstruita multekoste de siaj vagkomercistoj en la dinastio Qing (1644-1911). Tie ankoraŭ restas 57 antikvaj domoj. Ni iris tra la ĉambroj jen dekstren jen maldekstren,

kiel en arta galerio. La strukturo kaj teknologio estas distingigaj. Ĉirkaŭ la domoj estas altaj muroj, kiuj formis rektangulan korton. La planko de la korto estis pavimita per ŝtono. En ĝi oni masonis florbedojn el ŝtonaj platoj kaj metis ŝtonajn tablojn, benkojn, vazegojn kaj trogojn. Ankaŭ la pordoj de la frontaj ĉambroj aspektas majeste. La linteloj kaj framoj de la pordoj senescepte estas ŝtonaj aŭ brikaj. Sur la porda alero estas skulptitaj homfiguroj kaj birdoj, bestoj, floroj kaj aliaj. La domframoj estas lignaj, unu- aŭ du-etaĝaj. En la domoj estas vestibloj antaŭa, meza kaj posta, ĉiuj kun flankaj ĉambroj. Inter la vestibloj estas kvadrata korto, de kie la sunradioj prilumas la ĉambrojn. Sur la trabo, fenestraj kradoj kaj pordaj linteloj estas delikate gravuritaj diversaj desegnoj. La plej ĉefa trajto de la loĝdomoj estas, ke ili havas multajn pordojn, kiaj portalo, interna pordo, fronta pordo, flankaj pordoj kaj posta pordo. Kial oni konstruis tiel multajn pordojn? Vilaĝanoj diris al mi, ke ĉiuj domoj de la vilaĝo traireblas per tiuj pordoj. En pluvaj aŭ neĝaj tagoj vilaĝanoj povas iri de tiu vilaĝfino al alia tra la pordoj, en vestoj nemalsekiĝintaj.

Promenante en la vilaĝeto oni povas vidi apartajn pordojn kaj fenestrojn: dekstre kaj maldekstre sur la pordo estas po unu longa fenestreto; la pordo kaj la fenestretoj portas lintelon similan al brovo, kaj tio montras kvazaŭ homan vizaĝon: la pordo kiel buŝo, la porda lintelo kiel nazo, la du fenestretoj kiel okuloj kaj super ili estas densaj brovoj. Estas tre interese, ĉu ne?

En la vilaĝeto estas antikva domo nomata "Jingxu-halo". La mastro, s-ro Yu Xitai, akompanis nin por ĝin viziti. Tie estas ses vastaj kaj helaj kortoj, ĉirkaŭ la domo estas verando kun balustrado. Simpla legoĉambro rigardas al korteto, sur kies muro estas niĉo en formo de kalabaso. Super ĝi estas kvar ideogramoj signifantaj: respekti paperon kun skribitaj vortoj. Oni




Lignaj gravuraĵoj de la domo

diris, ke de sia infanaĝo la klerulo en Wuyuan scias respekti tian paperon. Ili neniam forĵetas la skribitajn paperojn, sed ilin forbruligas respektoplene por esprimi sian estimon al la ideogramoj.


La mastro prezentis al ni, gastoj el malproksima loko, bonodoran verdan teon de Wuyuan. Li diris al mi, ke jam en la dinastioj Ming kaj Qing la verda teo de Wuyuan estis tributo kaj gajnis oran tabulon kaj arĝentan medalon de imperiestroj. Dum la regado de la Qing-dinastia imperiestro Qianlong (1736-1795 sur trono) la verda teo eksportiĝis al diversaj landoj de Eŭropo, Ameriko kaj Afriko.


La kelktaga vojaĝo en Wuyuan perceptigis al mi naturan honestecon de vilaĝanoj. En mia cerbo ŝvebas bildoj: ĉe rivero junaj edzinoj kun vanilo kaj sovaĝaj floroj sur la kapo lavas vestojn per ligna batilo; antaŭ pordoj maljunaj virinoj kudradas; sur kampoj kamparanoj kun pipò en la buŝo trikvarope babiladas; ĉe vilaĝfinoj kaj en stratetoj knaboj 5-6-jaraj portas pajlon por plekti ĉifonfiguron...




Vilaĝo inter monto kaj rivero

Loĝdomoj en la antikva urbeto







Profunde de strateto



Antaŭ domo de kamparano

Aĵuraj pordklapoj



1. Funkcio:

Kuraco de neŭrastenio

2. Preparo:

Antaŭ enlitiĝo metu viajn piedojn en varmetan akvon por kelka tempo. Elakvigu ilin kaj frotu la piedkavojn per la mano 50-100 fojojn kaj post tio faru la ĉigong-an ekzercadon.

3. Teniĝo:

Kuŝu surdorse kun la du supraj membroj nature etenditaj, la mankavoj malsupren ambaŭflanke de la korpo, la du malsupraj membroj nature etenditaj je la distanco de la du ŝultroj, la piedpintoj nature turnitaj eksteren en la formo de la litero V. Reguligante la teniĝon, rigardu antaŭen, supren per ambaŭ okuloj. Post tio iom

POR VIA SANO

Kuŝa ĉigong-o


de GAO RONGHUA kaj YUYAN

post iom retiru vian rigardon al la nazpinto. Irigu la rigardon ĝis la pubo. Fermu la okulojn kaj lipojn, kunpremetu la dentojn. (Vd. la bildon.)

4. Spirado:

Komence spiru plenpulme kaj iom post iom spiru nature.

Enspirante, imagu al vi, ke la vitala energio sin enpremu en vian pubon de ĉiuj flankoj. Elspirante, imagu al vi, ke la malutila kaj eluzita energio pafiĝas eksteren. Faru tion 6-12 fojojn kaj poste spiru nature kaj samtempe ĉesigu la imagon.



KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respond-kuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* S-ro Liu Baoguo dez. kor. tm. pri uŝuo, ĉigong, ŝako ktp. Sendu al: Anhui Yin Ran Chang, He Ping Lu 4 Hao, Hefei, 230011, Ĉinio.

* Yang Xiaohua, 29-j. instruisto de la angla lingvo, dez. kor. kun amikoj precipe el la landoj de la angla lingvo kaj Japanio, interesiĝas pri poezio, instruado de lingvoj kaj ĉigong (ĉefe uzata por kuraci malsanojn malfacile kuraceblajn. Mi lernas ĝin el mia avo, kiu estas veterana ĉigongisto.) Esperante, angle kaj japane, Adr.: Dahe Mianfangchang, 271000, Tai'an, Shandong, Ĉinio.

* Ĉu vi jam legis? Dek Rakontoj el Vieno. 32 paĝoj, 4.80 gld. Hospitalo Sepetaĝa. Originala novelo. 16 paĝoj, 3.00 gld. Sukero, Nutrado,

Kario. 20 paĝoj, 3.00 gld. Libroservo de UEA.

* Renzo Koren, 40-j. ingeniero, dez. trovi korespond-amikojn el Ĉinio. Adr.: Resetarova 36, 41090 Zagreb, Kroacio, Jugoslavio.

* Aperis Hipersigno-La Hiperlingvo-La ideala homa lingvo por labori ĉe komputiloj. Perkomputila 56-paĝa broŝuro kontraŭ 8 (ok) internaciaj respond-kuponoj ĉe Itamar Alves Pinto/Rua Independencia, 101/BR-34000/Nova Lima-MG/Brazilo.

* Alice A Klein, 64-j. Esp. instruantino, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, kolektas poŝtmarkojn. Adr.: jose do patrocínio 589/204-B, 93310-N. Hamburgo-RS-Brazilo.

* Venislovas B.K kaj V. Zarskiene dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Ab/k. 7. 5240 Joniskelis, Lithuania.

* Poŝta Komerco-Aĉetu diskojn CD, LP kaj kasetojn, brazilaj aŭ internaciaj muzikoj, faritaj en Brazilo. Volante informojn sendu unu respondkuponon. Caixa Postal-1369, guiz de Fora-MG,

Cep 36.001 Brazilo.

* Fulvio Scarpa korespondas sole kun kristanaj monaĥoj, pastroj kaj lernantoj. Adr.: Esperanta ĉefklubejo Kacabrafako, Dopolavoro Ferroviario, Reggio Cacabria, Italia.

* Ĉornuka Roman Vasiljeviĉ, 16-j., dez. kor. tm., interesiĝas pri kuirarto, muziko, leĝo, kolektas pm. kaj bk. Adr.: ul. Gorjkogo, 62, s. N-Vladimirovka, Golopristsanskij r-n, Ĥersonskaja obl, Ukrainio 326273.

* Zoran Nikoloski, 20-j. fraŭlo, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, kolektas pm. kaj bk. Adr.: Pere Temelkoski 37, 97500 Prilep, Jugoslavio.

* E Cerendolgor, 21-j. komencanto, dez. kor. tm., kolektas pm. kaj bk. Adr.: Poŝta-49, Poŝt restante, ĉ. Ulanbator, 210349, Mongolia.

* Hamid Eataei, 20-j. fraŭlo, dez. kor. kun gejunuloj tutmondaj angle kaj Esperante, interesiĝas pri diversaj temoj, kolektas bk. kaj pm. Adr.: P.O.Box 81465-653, Isfahan, Iran.

Mi ne aŭdis

(humuraĵo)

Maha instalis sonorilon ĉe la pordo de sia domo. Vizitantoj ne rimarkis tion kaj ĉiam frapis je la pordo.

Iun tagon venis vizitanto al li kaj frapadis je la pordo.

Maha kolere kriis al la pordo: "Mi ne aŭdas frapadon. Premu la butonon de elektra sonorilo!"

Da dentoj kordono post kordono.

II

En domo ne tre granda ene de kulvualo ruĝa dormas bebo blanka.

III

Sopiras ĝi al lumoj sunaj,
Nefiera, ĝi altstatura,
Ĝi tenas l' kapon pli malsupren,
Kiam la planto 'stas matura.


IV

La objekto rampas mure.
Floras floroj korne.
Per la ruĝaj, blankaj koloroj
Ĉarmas ĝi subsune.
(Solvoj troveblaj en ĉi numero)


Enigmoj pri vegetaĵoj

I

Plantaĵo havas vidon strangan:
Ĉe tali' estas barbo longa,
Malsupre de ĝi sin kaŝas



Ekblovis vento



Malfluso

NOVA SERVO POR LEGANTOJ DE EL POPOLA ĈINIO!

La Belga peranto, nome **ELDONEJO & LIBREJO SONORILO vzw, Doornstraat 22, B-2610 WILRIJK, Belgio, telefonnumero 03/827.24.05**, anoncas, ke la legantoj de nia revuo "EL POPOLA ĈINIO" nun povas mendi siajn Esperantajn librojn kaj revuojn kaj pagi ekde nun per kreditkarto "VISA". Se vi posedas kreditkarton "VISA", sciigu al ni en via mendo ĝian numeron kaj validoda-

ton kaj subskribu. Tiele via abono je EL POPOLA ĈINIO povos aŭtomate plidaŭri en 1992 sen problemo, sen bankkosto! ELDONEJO & LIBREJO SONORILO vzw estas organizaĵo kun tre abunda sortimento de libroj en kaj pri Esperanto. Ĉe ni vi povas ĉiam aĉeti en favoraj kondiĉoj: akurate kaj malmultekoste. Tio estas nia celo kaj via avantaĝo.

Honesta knabineto

MIA amikino petis min aĉeti akvomelonon por ŝia naskiĝtaga kunveno en vespero. Tagmeze, preterpasante akvomelonan bazaron, mi venis al stando, knabineto de la stando diris al mi: "Onklino, bonvolu iom atendi, se vi volus aĉeti akvomelonon. Mia patro hejmeniris por tagmanĝi, sed baldaŭ revenos." Efektive mi ne sciopovis elekti melonon, sed tiam mi

frapetis tiun kaj alian, ŝajnigante min sperta. Mi demandis: "Ĉu viaj akvomelonoj estas dolĉaj?" Dirinte, mi tuj sentis la demandon superflua. Kiu florvendisto ne laŭdas, ke liaj floroj estas plej bonodoraj? Sed ekster mia atendo, la knabineto respondis: "Ĵus mi manĝis pecon da melono, kaj tiu estas ne sufiĉe dolĉa." Estis por mi la unua fojo, ke mi aŭdis tian vorton de vendanto de akvomelono. Mi tre admiris la honestecon de la knabino. Timante mokon de mia amikino pri mia senkapableco, mi foriris sen aĉeto, kvankam mi tre volontus aĉeti ĉe ŝi akvomelono.

Ĉe alia akvomelona stando staris el inter amaso de akvomelonoj tabulo, sur kiu estis skribo: "Ĉi tie akvomelonoj la plej bonaj en la urbo!" Mi min enpuŝis en la homamason por elekti. Ĝuste tiam post mia dorso leviĝis insulto "Sentaŭgulino! Kial vi diris, ke la melonoj estas nedolĉaj? Kial vi tiel diris?" Turninte min pro scivolemo, mi trovis, ke mezaĝa viro batas la knabinon per pesilvektio. Mi

mallaŭte demandis apudan avinon, kiu vendis liĉiojn, kaj ŝi diris: "La patro koleras pro ŝia ligna kapo en negoco. Verŝajne la knabino meritas. Kiam oni elektis ŝiajn melonojn, ŝi diris ke ŝiaj akvomelonoj ne estas sufiĉe dolĉaj, kaj tiele ŝi fortimigis la aĉetantojn." Ve, ĉu estas kulpo diri la veron?

Mi pensis, ke se la knabino trompus min, mi certe aĉetus ŝian akvomelonon, sed kial mi ne aĉetis ŝian melonon, kiam ŝi diris la veron? Ĉu tio ne estas "premio al mensogulo kaj puno al honestulo"? Mi sentis konscienciproĉon.

Puŝate de iu forto, mi kuris al la knabino kiel eble plej rapide. "Knabineto, mi aĉetu vian akvomelonon!" Mi prenis la plej grandan melonon kaj ĝin metis sur la pesilteleron. La viro postulis min pagi. "Ses juanoj kaj du jiao-oj." Sed mi donis la monon ne al li, sed al la knabino: "La restaj ok jiao-oj estas kiel premio por vi." Fakte, pro ŝi mi aĉetis la akvomelonon, precize pro ŝia honesteco.

Vespere, la granda akvomelono estis tranĉita sub la brilaj kandeloj. La nematura pulpo tuj vekis mallaŭdon de la amikoj. Gustuminte, preskaŭ ĉiuj diris ke la melono estas nedolĉa. Mi rakontis al ĉiuj pri la knabino, kaj iuj laŭdis min, dum aliaj ne. Kompreneble, estis domage pagi sep juanojn por nedolĉa melono, sed estis inde por kuraĝigi knabinon diri veron. Honesteco ne havas prezon, kiom da mono egalas al vero? Mi ne povas imagi al mi. Eble vi ne povas akiri honestan vorton kontraŭ mil aŭ dek mil juanoj. Mi emociiĝis pro ŝia honesteco. ■



(Daŭrigo de p. 16)

lernas nur ĉ. 9 personoj. La instruisto figure kaj vivece donis lecionon per gestoj kaj objektoj.

En Oostende ni estis varme akceptataj kaj helpataj de la lokaj

esperantistoj. Ni sentis apartan intimecon, gastante ĉe gesinjoroj Flory WITDOECKT kaj Walter VAN DENKIEBOOM, geedzoj André DHULSTER-BOUDT, geedzoj Manuel ALBERTO, s-ro Raymond WYLLEMAN kaj juna

esperantisto s-ro M. Marc CUF-FEZ. Nia vizito estis mallonga, tamen la profunda amikeco ĉiam restos en nia koro.

Nun ni atendas la baldaŭan renkontiĝon kun niaj amikoj en Qingdao! ■

Sonorado de Qutan-templo

Teksto de WANG XIAN

Fotoj de ZHENG YUNFENG

HUANGSHUI-RIVERO trafluas la urbeton Nianbo de la gubernio Ledu kaj dividas la lokon en du partojn Nanshan kaj Beishan. La loĝantoj de Nanshan neniam nomas sin nanshan-anoj, kaj preferas nomi sin loĝantoj ĉe Qutan-templo. La templo Qutan ja estas fiero de la loĝantoj de Nianbo kaj de la provinco Qinghai.

POST VIZITO AL QUTAN-TEMPLO ONI NE PLU BEZONAS VIZITI PEKINON

Pasintecce en Qinghai-provinco

ĉirkuĝis la diro: "Post vizito al Qutan-templo, oni ne plu bezonas viziti Pekinon." Arkitekture tiu antikva templo tre similas al la Imperiestra Palaco kaj iuj konstruaĵoj de Ming-dinastio (1368-1644) en Pekino.


Komence Qutan-templo estis malgranda budhisma templo, kies fondinto estis lamao Sanluo, deveninta de Shannan de Tibeto. Li naskiĝis en la 13-a jarcento kaj estis samtempulo de Congkapa, fondinto de la flava sekto de lamaismo. En sia juneco li forlasis la hejmon kaj venis al Haixing-monto ĉe Qinghai-lago por memkulturo. Poste li kaj nombro da homoj

transloĝiĝis al Ledu kaj konstruis Qutan-templon. Tiutempe mongoj ofte atencis la lokon kaj la tibetnaciecaj triboj ĉe Qinghai-lago translokiĝis orienten por peti protekton de lamao Sanluo. Pro la merito pacigi la landliman regionon, Sanluo ricevis personan aŭdiencon kaj kuragigon de Zhu Yuanzhang, la unua imperiestro de Ming-dinastio, kiu tronis de 1368 ĝis 1398. Laŭ peto de Sanluo, la imperiestro nomis la templon "Qutan". Qutan en sanskrito signifas Gotamon, la familia nomo de Ŝakjamunio, la fondinto de budhismo. De tiam Qutan-templo ricevis apartan favoron de 7 el la 13 imperiestroj de Ming-dinastio, kaj havas la nunan grandiozan skalon post plivastigado. Nun en la templo konserviĝas 5 sigeliloj kaj 10 horizontalaj tabuloj kun surskribaĵoj donacitaj de imperiestroj. Ĝi estis konstruita pli frue je 100 jaroj ol Tar-templo kaj travivis proksimume 500 jarojn. Ĝi estas ne nur la plej frua templo de lamaismo de Ĉinio, sed ankaŭ antikva templo de Ming-dinastio, kiu konserviĝas plej bone kaj havas plej grandan historian kaj artan valoron.

Post duonhora aŭtoveturado mi atingis Qutan-templon 25 kilometrojn fore de la gubernia urbo.

La templo havas areon de ĉirkaŭ dek mil kvadrataj metroj. Antaŭ la templo rojas klara rivero, en

Skemo de la antikva vojo Tangbo



la templo orde dislokiĝas pavilonoj kaj kioskoj. Enveninte tra la portalo, mi iris internen laŭ la akxa linio kaj vizitis unu post alia la Halon de Giganto-gardistoj, Halon Qutan, Halon Baoguang (trezoraj lumoj) kaj Halon Longguo (prosperigo de lando). Tiuj haloj estas imponaj kaj grandiozaj unu pli ol la alia. Ambaŭflanke de la haloj staras kioskoj de steleoj kun imperiestraj surskribaĵoj, alaj koridoroj, grandaj kaj malgrandaj sonoril-kaj tambur-turoj, relikvostupaĵoj, haloj por Budho kaj haloj de budhismaj sutroj en simetria dispozicio.

La Halo Qutan estas la plej frua konstruaĵo en la templo. Sur la linto sub la interna alero pendas horizontala tabulo kun tri orumitaj ideogramoj signifantaj "Qutan-templo" kaj la surskribo "La 26-an jaron de Hongwu de Ming-dinastio". Tio signifas, ke la tabulo estis farita laŭ edikto de imperiestro Zhu Yuanzhang en 1393, la dua jaro post la kompletigo de la templo.

El la konstruaĵoj de Qutan-templo la plej impona kaj grandioza estas la Halo Longguo sur la larĝa bazamento, la plej alta en la templo. La bazamento etendiĝas fronte kun teraso ĉirkaŭita de balustrado el ruĝa ŝtono. La supro de la balustroj estas skulptita en globon, ĉe la malsupra parto de la apogilo estas skulptita florcirklino kun lotusa folio kaj sur la ŝirma plato estas skulptita cisterno en formo de begonio.

Sur la ŝtona lotus-forma soklo en la centro de la Halo Longguo staras ligna tabulo alta je ĉirkaŭ du metroj, sur kies fronta flanko estas orumitaj ideogramoj en la ĉina kaj tibeta lingvoj kun la signifo "Vivu, longe vivu la imperiestra moŝto", kaj sur la dorsflanko estas surskribitaj ideogramoj kun la signifo "starigita de imperiestraj eĥnukoj Meng Ji, Shang Yi, Chen Xiang kaj Yuan Qi, la 9-an de la dua monato de la dua jaro de Xuande de Ming-dinastio", t.e. en la jaro 1427. Ĝuste en tiu tago finkonstruiĝis la Halo Longguo. Tio an-

koraŭfoje montris la neordinaran intiman rilaton inter Qutan-templo kaj la kortego de Ming-dinastio.

Same kiel la supre menciita ligna tabulo, ankaŭ la ŝtona elefanto estas rimarkinda kultura heredaĵo de la Halo Longguo. La ŝtona elefanto kuŝas kun floro en la rostro kaj kun la kapo returnita, kvazaŭ ĝi rigardas ion. Sur ĝia dorso estas flosantaj nuboj, inter kiuj estas granda tamburo farita el led. Ĝi estas artaĵo kun romantika ĉarmo kaj viveca spirito, kiu montras la mirindan imagipovon de la aŭtoroj.

FRESKOJ EN ALAJ KORIDOROJ

La alaj koridoroj de Qutan-templo estas nomataj "72-ĉambraj akvokondukaj haloj". Laŭdire, sur la tereno de la Halo Longguo estis fonto nomata Qutan. Oni konstruis grandan majeston halon kaj super la fonto malgrandan halon por la dio de la fonto altan je 3 metroj. Sekve, Qutan-templo havas tre distingigan trajton: en la templo estas halo, en la halo vidiĝas malgranda halo kaj en la malgranda halo kuŝas fonto. Vere estas miraklo en la arkitektura historio, ke tiu ĉi grandioza templo kun fonto en si travivis pli ol 500 jarojn kaj restas fortika sur la bazamento.

La "72-ĉambraj akvokondukaj haloj" fakte havas nur 51 ĉambrojn. La alaj koridoroj iras laŭ la fluo de fontoakvo, jen alten, jen malalten kaj estas interligitaj per oblikvaj koridoroj. 28 el la 51 ĉambroj estis pentritaj je grandegaj koloraj freskoj, dum la freskoj en la aliaj ĉambroj detruigis antaŭ pli ol du cent jaroj pro liko de la konstruaĵoj. Nun sume 36 muroj surhavas freskojn, inter kiuj la plej granda altas 3 metrojn kaj larĝas 5.6 metrojn, kaj la plej malgranda altas 2.3 metrojn kaj larĝas 3.5 metrojn. La totala areo superas 360 kvadratajn metrojn. La freskoj ĉefe temas pri la tuta vivo de Ŝakjamunio de naskiĝo ĝis morto. Homfiguroj, astroj, montoj, riveroj, arboj, floroj, animaloj kaj konstruaĵoj formis grandiozajn scenojn.

Tiuj freskoj estis pentritaj per ĉer-farboj. Kvankam forpasis jam pli ol 400 jaroj, tamen tiuj freskoj restas ankoraŭ brilaj kaj freŝaj. Laŭ la pentr-arto kaj stilo, la freskoj estis faritaj en malsamaj tempoj. La fru-tempaj freskoj ĝenerale havis respektivan temon. Kvankam la enhavoj malsamas unu de alia, tamen la natura fono estas kontinua. Ĉiu fresko estas komencita per himno kaj antaŭ la poemo estas temo de la rakonto. Tiuj frutempaj freskoj karakteriĝas per antikveco kaj simpleco de pentr-arto, monotoneco de la bildoj kaj malfreŝeco de la koloroj. La malfruaj freskoj distingiĝas per klaraj nuancoj de helfreŝaj koloroj, reliefo kaj densa vivetoso. Sur iu fresko estas pli ol 30 homfiguroj, pro tio la bildoj montriĝas iom kompaktaj. La freskoj en la alaj koridoroj estas grava kaj valora konsistiga parto de Qutan-templo.

SURPRIZIĜO DE ĈEVALO DE BAYAN PRO SONORADO DE JIAOCANG

Antaŭ ol alveni al Qutan-templo, mi jam aŭdis la diron konatan de ĉiuj lokanoj: "Eksonas la sonorilo de Jiaocang, kaj surpriziĝas ĉevalo de Bayan". Jiaocang estas sidejo de Qutan-templo kaj Bayan estas la nuna Hualong-a Hui-nacieca Aŭtonoma Gubernio dorse de Nanshan-monto, 15 kilometrojn fore de la templo. Tie prosperas arbaroj kaj gresejoj. La diro aludas, ke la sonoj de la sonorilo de Qutan-templo povas atingi laŭvente la gresejojn de Hualong. Estas rakonto pri la sonoj de la sonorilo de la templo. Farinte la grandan sonorilon, la muldisto deziris scii, kiom malproksimen povas atingi la sonoj, kaj petis la sonoriston frapi la sonorilon, post kiam li iris tre foren. Li plenforte kuris al la neĝa Nanshan-monto. Kiam li kuris ĉirkaŭ 15 kilometrojn, la sonoristo perdis paciencon kaj ekfrapis la sonorilon. Aŭdinte la sonojn venintajn de malproksime, la muldisto ripete diris: "Bedaŭrinde, bedaŭrinde, la sonoj povas atingi pli malproksimen!" Tiel la sonoj de la sonorilo de



Ligna tabulo kun skribo "Vivu, longe vivu lia imperiestra moŝto" en la halo Longguo

Qutan-templo haltis ĉe Nanshan-monto.

En la malantaŭa tambur-turo norde de la Halo Longguo mi vidis la bronzan sonorilon inspirantan senlimajn imagojn. La sonorilo altas proksimume je 2 metroj, kaj ĝia faŭko diametras je 1.5 metroj. Sur-face estas grandaj ideogramoj en la

ĉina kaj tibeta lingvoj kun la signifo "Oferita en la periodo de Xuande de Ming-dinastio". La sonorilo jam fendigis. Vidante la fendojn kaj bovine grandajn truojn, ni tre bedaŭris, ke la supre citita diro fariĝis eterna pasintaĵo, ke oni ne plu aŭdos la ĉarmajn kaj klarajn sonojn de la sonorilo.

Adiaŭinte la antikvan templon, ni daŭrigis nian vojaĝon laŭ la antikva vojo. Antaŭ niaj okuloj leviĝis la sceno: Longa karavano kun la doto sekvanta principinon Wencheng persiste marŝas antaŭen sur la vojo al Tibeto, la orumita busto de Ŝakjamunio radias blindigan brilon, benante siajn lojalajn adeptojn per paca vojaĝo. ■



Templo Qutan

Fresco en la ala koridoro





Fresco kun vivetoso



Tamburo sur elefanto

Longguo-halo



Knabineto en printempo
de **ROBERTO GUILLERMO
PONS** (Argentino)



Somermeza danco en parko
de **MALTE MARKHEDEN**
(Svedio)

